NOVEMBRO / DECEMBRO 1985

63 (81)

ISSN 0150-5823

Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista

Unu numero : 5 FF. Unujara abono kun adresaro : 28 FF

Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :

**Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut**

---

# ĈIUJ MURDISTOJ

En Meksiko, fine de septembro kaj komence de oktobro, tage kaj nokte, diligentaj homoj pene luktis kaj baraktis por savi la vivon de naŭjara infano. Vane, ho ve ! La malfeliĉa knabo mortis, viktimo de la tertremo (kaj eble ankaŭ de sen-konscienculoj, kiuj pli zorgis pri sia profito ol pri la sekureco de domoj de ili konstruitaj). Vana estis la peno de tiuj kuraĝ-uloj, sed ilia ago restas kiel ekzemplo de humaneco.

Dume aliaj homoj (ĉu homoj?) ĉiutage mortigas infanojn en diversaj lokoj de la mondo. Ĉu homoj ? Certe ne bestoj, ĉar eĉ la plej sovaĝaj bestoj mortigas nur pro neceso, pro la be-zono sin nutri - sed ankaŭ ne veraj homoj : teroristoj kaj soldatoj.

Probable iuj protestos : soldatoj ne estas kulpaj, ĉar ili nur obeas al ordonoj, pro devo. Ĝuste : ili kulpas tion, kion Han Riner nomis "la krimo obei".

Mi konsentas, ke estas gradoj en la krimo. La ordonanto estas pli kulpa ol la plenumanto. La ĉefa kulpulo pri Hiroŝima estas prezidento Truman ; tamen la aviadisto, kiu ĵetis la bombon, klare komprenis, ke li havis almenaŭ parton en la kulpo. Same ĉiu el la miloj da anonimaj aviadistoj, kiuj detruis

centmilojn da homaj vivoj en Dresdeno, Hamburgo, kc.

Ĉu do ni rajtas ilin kondamni, ni kiuj estas nek teroristoj nek soldatoj ? Ni, bonaj civitanoj, kiuj balote elektas registojn, kaj tiuj ĉi ordonas masakrojn en nia nomo. Ni, akurataj impostpagantoj, kiuj havigas al ili monon, per kiu ili fabrikigas armilojn kaj instruas junulojn en la nobla arto leĝe murdi. Jes, ni ĉiuj estas kulpaj ; se ne senpere krimuloj, almenaŭ komplicoj. Kaj ni ne pretendu pri nescio : ni ja scias, kaj ni persistas en nia kulpa sinteno. Ni balotas, militservas, pagas impostojn al la buĉa ŝtato.

Ho ci homaro, kiel malrapide ci progresas !

Valo

************************************************************

24 gelaŭtuloj el 6 landoj kontribuis al tiu ĉi 63a **L!**, kiu preskaŭ perfekte spegulas la nun tute elprovitan formulon de nia bulteno. Ke tiu formulo plaĉas al la plimulto, jen evidentaĵo, laŭ la ricevitaj laŭdoj. Tio nepre ne signifas, ke ĉiuj same opinias pri la diversaj temoj. **Feliĉe**, ne! Sed ĉiu scias, ke ŝi/li havas la saman rajton sin esprimi kiel tiuj, kiuj, pli verkemaj, ofte subskribas artikolojn.

Legantino rimarkigis, ke la ĝenerala "tono" ne estas gaja. Kaj ŝi pravas. La plimultajn kontribuantojn plej ofte ŝokas la nuntempaj problemoj de homaro, kiu, malgraŭ siaj teknikaj atingaĵoj, ne sukcesas uzi sian naturan agresemon por realigi la harmonion, kiun alstrebas multaj religioj kaj filozofioj. Vole-nevole, kaj kvankam multaj esp-istoj flegas esperanton pli por fuĝi el monda frenezo ol por ĝin kuraci, ni ĉiuj esprimas la kontraŭdirojn, la konfuzon de nia epoko.

"Rido sanigas!" asertis dum sia tuta vivo la E-pioniro Josef Burger. Kaj ankaŭ li pravis. Ĉu la venontaj **"Laŭte!"** aspektos tiuspecaj sanigiloj ? Al tio la red. ne povas respondi. Tio dependas de ĉies emo, ĉu ne ?




Kaj nun la jarfina tradiciaĵo : ĉiu bonvolu kontroli sur la lasta paĝo, ĉu ne venis por ŝi/li la tempo reaboni:

* por 1986 : 28 FF
* por 1986 + 1987 : 58 FF

Antaŭdankas la red.-adm.-balaanto

Kribo

*Nia 21a debato per ĉenleteroj*

# DISSIRO




## ĈU PROPRUMEMO ESTAS ĤRONIKA MALSANO ?

***Enkonduko de Ĝiz el Lamark :***

*Laŭ la antikva filozofo Platono, la plej sana respubliko estas la anarĥia : oni produktas nur la bezonaĵojn, interŝanĝas la produktaĵojn, vivas en simpla kaj sana komunumo ne bezonanta registojn, kuracistojn aŭ militistojn ; sed la luks-avido kaj la proprumemo de la homoj necesigas fortan ŝtaton : kaj laŭ Platono la plej perfekta formo de tiu lasta estas la duonkomunisma respubliko de li prezentata en la dialogo "Respubliko". Temas pri reĝimo bazata sur la principo, ke ĉiu civitano devas fari nur unu laboron, tiun por kiu ĝili estas plej taŭga, laŭ sia karaktero kaj kapabloj.*

*La civitanoj estas dividitaj en tri klasojn (ne heredajn) : la proprumemaj kaj gajnamaj homoj konsistigas la plej multnombran klason, la Aferistan ; ili devas dece vivteni la du superajn klasojn defendantajn la ŝtaton, t.e. la "Gardistojn" kaj la "Militistojn", ĉar neniu el tiuj klasoj povas havi privatan posedaĵon aŭ plenumi salajratan laboron. Platono opiniis, ke per zorga elektado kaj genetika plibonigado (kaj ĉiurimeda mens-kondiĉado ekde la infaneco) oni reale povus produkti bonajn gegardistojn, kapablajn senerare piloti la ŝtaton, kaj*

fidelajn, kuraĝajn gemilitistojn, pretajn entuziasme batali kaj morti por la ŝtato - kaj por alies privataj posedaĵoj. Se la superaj klasoj estus proprumemaj, aŭ se la riĉeco estus rigardata kjel plej alta bono, kompreneble tiu ŝtato ne daŭrus... unu jaron ; sed se tiu reĝimo estas ARISTOKRATA, kiel proponas Platono, la Gardistoj-filozofoj kaj la Militistoj-"samurajoj" ĝuas la respektegon de ĉiuj pro la "oro" kaj la "arĝento" fanditaj de la dioj en ilian animon ; kial ili bezonus vulgarajn riĉaĵojn, kompensantajn la genetikan malsuperecon de la "bronz-animuloj" kaj "fer-animuloj" ? Cetere, la du komunismaj klasoj ja disponas je la necesaj nutraĵoj por la korpo kaj por la spirito en siaj komunaj loĝejoj ; ili havas la povon devigi la Aferistojn pagi la "ŝuldon" al iliaj defendantoj, se tiuj emus rifuzi ; kaj se la eduko je la estontaj Gardistoj kaj Militistoj estas tiel ampleksa, kompleta kaj kondiĉanta, kiel ĝin priskribas Platono, ili (tre eble) plene kontentiĝas je sia pozicio en la ŝtato.

En sia unua verko, "**Kio estas la proprumeco?**", la "anarĥia" socialisto Prudono (Proudhon) obĵetas al Platono, ke lia komunisma respubliko postulas la sklavecon, kaj ke la absoluta komunismo estas tiel danĝera por la homa spirito kiel la absoluta proprumismo. Sed la respubliko Platona ne estas absoluta komunismo, ĉar la Aferistoj (t.e. kamparanoj, metiartistoj, butikistoj, negocistoj, kuracistoj, ktp...) ja povas riĉiĝi - en la limoj de la ŝtata sekureco - kaj ankaŭ elekti alian laboron, al kiu ili sin sentas pli taŭgaj : ĉar la ŝtata pluvivado necesigas rigoran elektemon nur pri la estontaj Gardistoj kaj Militistoj, kompreneble la Gardistoj-psikologiistoj ne tro interesiĝas, se juna Aferisto preferas elekti al si alian laboron aŭ profesion. La celo de la Gardistoj estas : BRIDI la proprumemon ĉe la Aferistoj, ke ĝi ne kaŭzu troan riĉecon aŭ malriĉecon, ĉar ambaŭ naskas revoluciemon, ELIMINI la proprumemon ĉe la du komunistaj klasoj per selektado kaj edukado... kaj ANTAŬMALHELPI la proprumemon de la najbaraj ŝtatoj per konstanta milita ekzercado kaj pli-malpli paca fortelmontrado.

Kiuj estas la sklavoj, laŭ Prudono ? Ĉu la Gardistoj kaj la Militistoj ? Sed ili havas la povon kaj la regpotencon. Ĉu la Aferistoj ? Sed ili - laŭ nia vidpunkto - estas pli liberaj kaj pli riĉaj : tio estas justa, laŭ Platono, ĉar en la Respubliko ili ludas la saman rolon kiel la impulsoj kaj deziroj sentumaj en la homa animo, do ili devas esti kontentigitaj sub la gvido de la racio !

Sed ĉu la proprumemo estas tiel danĝera, ke oni devas submeti ĝin per ĉiu rimedo ? Aŭ ĉu ĝi estas eĉ utila por la



homa specio ? Ĉiukaze, ĝi estas pli danĝera por la racio ol la proprumeco mem ; tiu sama Prudono, kiu asertis : "la proprumeco estas ŝtelo", donis rifuĝejon en sia hejmo al la proprumemo : ja en lia patriarĥisma revo "ĉiu viro egalas antaŭ la leĝo, kaj ĉiu el ili en sia domo estas reĝo (super la edzinoj kaj gefiloj, kompreneble!). Ĉiu, kaj ĉia viro ! Ĉu Prudono konsciis, ke lia racio estas poluciita de tiu ĥronika malsano nomata proprumemo ??

Komparu la du solvojn : Platono proponas aristokration - t.e. regadon far' de la plej bonaj, kaj klopodas montri la rimedojn por eviti degeneriĝon ; ekzemple, la anoj de la du komunismaj klasoj ja havas multajn idojn - evidente por plibonigi la specion - sed ili ne scias, kiuj el la infanoj de la ŝtataj edukejoj estas iliaj infanoj ; cetere, bone eduki la infanojn, kaj precipe malkovri ilian naturan inklinon por iu aŭ tiu socia tasko, estas laŭ Platono tro grava afero por ĝin lasi al la genetikaj gepatroj : ili devas rigardi la tutan ŝtaton sia familio, kaj klopodi por ĝi.

Prudono proponas "virokration" kaj rigardas tre maljusta la "aŭtoritaton de viro super alia viro" kaj la proprumecon, kiu malpermesas al ĉiu viro havi ekvivalentan posedaĵon sur la tero : ĉiu viro, ĉu laborema aŭ mallaborema, saĝa aŭ stulta, virta aŭ malvirta, rajtus repostuli sian parton de la komuna heredaĵo de la homaro (= viraro?) por ekspluati ĝin kaj vivteni sin kaj sian familion ; en la verko "**Pornokratio**" Prudono ĉiurimede penas pravigi la virokration, eĉ rekonante al la virino "naturon" pli bonan ol tiu de la viro ; ŝi, la Ideala Virino, estante pli bona, ne devas miksiĝi en la aferoj sociaj, sed resti en la familio kiel Gardisto... ja sen propraĵoj kiel tiuj de Platono, sed krome sen povo efektiva gvidi la familion.

Ĉu tiel ega malkoheraĵo ne devenas de potenca influo de proprumemo kontraŭ la racio ? Kaj ĉu estus eble, ke la proprumemo kontentiĝu regi en malgranda familio, kaj ne deziru plivastigi sian agosferon kaj submeti la aliajn (pli malfortajn) virojn, restarigante la "maljustan regadon" kontraŭ kiu Prudono verkis "**Kio estas la proprumeco?**" ??

Fu, mi skribis jam tro multe kaj eble tedis vin... do mi mallonge reproponas la temon de tiu ĉi debato : Kion vi opinias pri la proprumemo ? Ĉu ĝi estas pli danĝera ol la proprumeco mem ? Ĉu ĝi, male, estas eĉ utila por la homaro ?

Ĝiz el Lamark

**Nicole D. :**

**Proprumeco** estas objektiva, konkreta, mezurebla, kontrolebla : pasiva ; estas fakto, stato...

**Proprumemo** estas subjektiva, moviĝema : aktiva ; malfacile kontrolebla kaj mezurebla...

Ŝajnas, ke proprumeco eblas, estas kaj disvolviĝas dank'al proprumemo, unu fortigas la alian kaj reciproke...

"Malsano" ne estas normala funkciado de la korpo kaj de la menso, ĝi ne estas "natura" al la homa konstituo. Sed estas natura homa kondiĉo la multaj tendencoj, kiujn oni taksas "bonaj" aŭ "malbonaj" laŭ la epokoj, la cirkonstancoj, laŭ la moralaj juĝoj...

"Tendenco" iĝas malsano eĉ danĝero, kiam estas troigo, neŭrozo aŭ psikozo. Estas gradoj, nuancoj konsiderendaj ; ekzemple : inklino, avido, ambicio, megalomanio, diktaturo, imperiismo...

Kiom da homoj propravole, konscie, povas plene vivi sen ion posedi ? sen proprigi al si ion kaj iun ? Certe maloftaj, kvankam religioj, filozofioj, postulas de siaj adeptoj forigi el si mem proprumemon, por atingi superan evolucian stadion.

Plejofte, por vivteni sin psike kaj materie, homo bezonas posedi aŭ almenaŭ kredi posedi.

Por konstrui sian personecon, sian identecon, je sia plej juna aĝo, homo bezonas gvidsignojn : kio kaj kiu apartenas aŭ ne al ĝia gento, ĝia medio, al ĝi mem, limojn inter si kaj la aliaj...

Proprumemo povas esti, plej ofte estas, "motoro" por vivteni sin, por sin protekti, por ĝui vivon, kaj tiamaniere aspektas pozitiva, utila por la homaro. Sed, kiel asertas filozofoj kaj pastroj, eblas, ke proprumeco estas iluzio kaj proprumemo vana strebo. Tion certe bone konscias sanktuloj, saĝuloj, kiuj forkonsentas riĉaĵojn kaj ĉiujn materiajn kaj honorajn posedaĵojn. Ĉar ili estas malmultaj, ili aspektas kvazaŭ supera kasto.

Ĉu ankaŭ ni devas celi forigon de proprumemo kaj konsekvence de proprumeco ? Ĉiu en si mem havas "respondon" !

Sed, ĉar la homoj estas nek perfektaj nek sufiĉe maturaj, evoluintaj, por starigi idealan socian organizadon tutmondan, necesas sin protekti : per leĝoj, sociordo, kiuj garantiu rajtojn kaj precizigu devojn, por bremsi, kontroli la proprumemon de la individuoj, de sociaj klasoj, kaj de la ŝtatoj mem. Por tion sukcesi, estus deviga vera, konstanta edukado de ĉiuj, ne nur de la infanoj kaj gejunuloj.

Jen mia klopodo por tiu vasta demando !



***Ĵanseb :***

*Mi ne estas proprumema.*

*Mi ja vivas sen televido. Mi ja vivis sen aŭto kaj daŭre vivus tiel, se la aliaj farus same kaj organizus la socian vivon laŭ la lokoj kaj horoj de la trajnoj.*

*Mi ne ŝatus vivi sen kulturo, sen esprimo, sen renkontoj. (Necesas mono por vojaĝi al kongresoj, ĉu ne ?).*

*Mi ne eltenus esti devigata rigardi futbalmatĉon ĉiutage, pro manko de intelektaj distroj.*

*Ĉiu havas bezonojn. Sed ili malsamas laŭ la individuoj. Iu bezonas teritorion, sur kiu li estas la estro, eĉ se temas nur pri dometo. Iuj bezonas honorojn, lokon en la socio kaj eĉ pretas oferi sian vivon por tio. Iuj bezonas povon kaj materiajn privilegiojn... Iuj tamen bezonas esprimon, kulturon, idealon, kreadon... ktp (la legantoj de L.!, ekzemple).*

*Tiuj bezonoj estas nepraj por ĉiu kategorio, kiu pretas klopodi por plenumi ilin.*

*Kiam la socio ebligas tion senpage kaj aŭtomate, proprumemo malaperas. En Francio, la muzeoj kaj bibliotekoj estas senpagaj : Tial (interalie) la intelektuloj malestimas proprumecon.*

*Kiam tiuj rimedoj estas malfacile haveblaj, oni luktas por havi ilin (monon, povon, honorojn aŭ esprimliberon). Tiun deziron konservi la rimedojn plenumi siajn bazajn bezonojn oni nomas proprumemo... ĉefe kiam temas pri materiaj deziroj.*

*En ĉiuj socioj estas Povo. Estas ankaŭ homoj, kiuj ŝatas ĝin, por ĝi mem, kaj por la avantaĝoj, kiujn ĝi havigas. Ilin oni trovas ĉe estrejaj kaj privilegiaj lokoj de ĉiaj socioj - kapitalisma aŭ komunisma.*

*Eĉ kiam oni volas forigi privilegiojn, oni kreas novajn : ĉar la amiko de tiu, kiu havas la rajton forigi la privilegiojn, estas jam privilegiulo.*

**Jean-Claude :**

Proprumemo estas deziresprimo. Sed kion oni deziras ?! Ĉar post atingo de la deziraĵo oni plu deziras.

Tamen estas momento, pri kiu oni neniam sufiĉe atentas : tiu, kiam oni posedas sian dezirobjekton. Tiam estas nur kontentiĝo, feliĉo, paco. Oni do povas konkludi, ke ĉiu fakte tiun pacon deziras.

Ĉu la objekto tion donis ? Pri tio oni povas dubi, ĉar oni konstatas, ke laŭ la cirkonstancoj sama objekto (materia aŭ ne) feliĉigas, malkontentigas nin aŭ nin lasas indiferentaj.

Konklude, tra proprumemo ni esprimas nian sopiron al sendeziro. Tio povas esti sufiĉe facile videbla per sincera kaj persista mem-observado.

Sed, vi diros, sen deziro vivo perdas sian sukon, ne plu penindas ! Male ! Vivo estas pli interesa ol ĉiam, ĉar sendeziro ne estas seninteresiĝo.

Kiam oni vidas, tra la homa historio, la fiaskon pli-malpli rapidan de ĉiu sistemo, oni povas sin demandi, ĉu la solvo ne estas - antaŭ ĉio - persona. Fakte, ĉiu el ni tion scias, sed regule ĝin forgesas, ĉar potenca estas nia timo nehavi.

Do intertempe estos bonvena ĉiu sistemo ebligonta plejeble kontentigan personan kaj socian vivon... kondiĉe ke ĝi estu rigardata nur kiel momenta solvo.

**Garolo :**

*Ne, proprietemo ne povas esti malsano, ĉar, laŭ anarkio mem, ĝi estas la nura maniero per kiu la homo povas vivelteni. Ĉiu homo devas proprieti (aŭ havi eblecon atingi, uzi) terpecon, naturpecon por ĉerpi, rikolti, kultivi, bredi, produkti siajn viveltenaĵojn, nutraĵojn aŭ aliajn rimedojn, kiuj kapablas kontentigi la homajn bezonojn. Tio estas fundamenta fakto en kiu ajn konsidero pri homa vivo en la homa medio : la naturo, sendepende de filozofio, de socia organizo aŭ pliaj artifikoj el homa deveno.*

*La kronikaj malsanoj fontas ĝuste en la homaj artifikoj, en la filozofioj, doktrinoj, ismoj. La proprietemo fariĝis malsano ekzemple en kapitalismo, ne pro la proprietado, sed pro homa avido, homa ĝuemo, homa pigremo, homa spekulemo, kaj pliaj homaj kvalitoj kaj pekoj de la homo, kiujn la propraj homoj ne kuraĝas akcepti kaj konfesi al si, kaj tio estas la aŭtentika psikozo, traŭmato kaj malsano de la homo.*

*Ni, ĉe SAT, ŝatas pritrakti la homajn kaj sociajn aferojn pere de racio. Estas tre bone, ke Ĝiz el Lamark enkondukis raciismajn filozofojn kiel Platono kaj Prudono, ĉar ĉe tiuj du filozofoj ni ĝuste renkontis la du ĉefajn antagonismajn skolojn de raciismo, kiuj gvidis niajn sociordojn. Unuflanke estas la evolucia, evoluiva pensmaniero, kiu baziĝas en principo de plena individua libero de la homo kaj same kondukas al kinetika koncepto de ekonomiko en memstara evoluado, kaj atingas ĝuste anarkion. Aliflanke estas la konstruiva raciismo, kiu alportis ĉiujn psikozojn kaj kronikajn malsanojn kiuj trafis la homojn en ĉiuj ĝisnunaj sociorganizoj de nia mondo, de Platono al Markso, kaj kie aperis la sklaveco de Grekio kaj Romio, la genocido de nacioj, la komunismo kun gulagoj* de Sovetio kaj ĉiuj absolutismoj ekzistintaj, ekzistantaj, ekzistontaj. La konstruiva raciismo predikas, ke ĉiuj homaj institucioj utilaj devas esti la rezultato de intenca kreado konscia de la homo, aŭ pli bone dirite konstruiva raciismo baziĝas en la principo, ke la homo devas antaŭfiksi, determini, plani iun celon, kaj ke ĉiuj rimedoj estas bonaj por tiun celon atingi... eĉ kiam oni forgesas la ĉefan objekton de la celo : la homon !

*Vi pravas, Ĝiz el Lamark, la filozofiaĵoj kiel tiuj de Platono alportis la belajn klasojn de "militistoj-samurajoj", de gardistoj, de aferistoj, de sklavoj. En tia stato de la Ŝtato, eble ne gravis kiuj estis la proprietuloj... Kio gravis estis, ke la sklavoj, negocistoj, eble servutuloj, donu la riĉaĵojn, produktaĵojn kaj ĉiajn orgiaĵojn al la Dioj, filozofoj, militistoj kaj samurajoj. (Tre bela estas la bildo pri samurajoj!)*

*Ĉu vi pensas, ke en la fluo de l'tempo la aferoj ŝanĝiĝis ? Tute ne. Tute ne gravas kiu proprietas la bienkapitalon, la produktilojn, ĉu kapitalistoj, ĉu la komunumo, ĉu la Ŝtatoj, sub kiu ajn reĝimo imagebla... La plejparto de la homoj, la salajruloj, la proletoj (modernaj sklavoj), kiel simpla instrumento de la sistemoj, devas doni sian sangon kaj ŝviton por la orgio de la modernaj samurajoj, por la avido de la privilegiuloj en la Ŝtatoj. Tiu monstra Ŝtato, kiu sukcesis kredigi al ni, preter la diroj de Prudono, ke proprieti estas ŝteli. La vera ŝtelisto estas ĝuste la ŝtato, kiu postulas senkompate nian sangon kaj ŝviton, en tributoj, impostoj, militoj kaj ĉiuspeca ekspluatado. La sola ekspluatanto estas la Ŝtato, kiu pretendas havi sur la individuon, regantan, leĝodonan, jurisdikcian kaj administracian povon, ĉu tiu Ŝtato venas de platona filozofio, ĉu tiu Ŝtato fontas el dialektike marksa, komunisma ideologio.*

*Laŭ Prudono mem, la proprietado far la Ŝtato estas la plej grava danĝero por sklavigado de la homo. Restas al ni konscii, ke estas nia devo (eble Prudono tion ne diris!) proprieti la vivrimedojn, la terpecon, la produktkapitalon, kie ni kapablas memstare vivelteni. La plej grava malsano nuntempa, kiu trafis la homojn kaj kondukas la sociorganizojn al ruiniĝo estas la kredo, ke tiu zorgo (pri nia viveltenado) devas aparteni al la kolektivo, al la komunumo, al la socio, al la Ŝtato.*

**Jakelino** : Mi atentigas Garolon, ke ne ĉiuj abonantoj de **Laŭte!** estas SAT-anoj, do ne taŭgas la esprimo "ni, ĉe SAT".. (Mi ne skribus en L! : "ni, ĉe la departementa biblioteko de

Malalta Elzaco", ĉar tio havas nenion por fari kun la fakto, ke mi abonas "**Laŭte!**").

**J.G. :**

*Laŭ la sociologoj proprumeco komenciĝis dum la neolitika epoko, kiam kelkaj homoj ne plu estis nur ĉasistoj sed sukcesis bredi dombestojn kaj kultivi la grundon. Tiamaniere ili ne plu estis devigataj klopodi ĉiutage por akiri vivrimedojn, sed ili povis havi stokojn, kiujn kompreneble ili ne konsentis dispartigi kun la eksteruloj : ili fariĝis propremuloj !*

*De tiu epoko proprumeco ekzistis ĉiam kun posedantoj kaj neposedantoj, sed laŭ variaj formoj (sklaveco, servuteco, laboristaro). Teoriuloj proponis "utopiajn" sistemojn por solvi la problemon : komunumojn kun privata aŭ kolektiva proprumeco, kun kaj sen mono, kun patriarka aŭ matriarka strukturo ktp.*

*La socialisma movado starigis socian modelon : kolektivan proprumecon de la produktrimedoj, sed individuan proprumecon de la konsumrimedoj. La israelaj kibucoj provis komunumojn preskaŭ tute sen proprumeco, sed ili kunigis nur pionirojn mense evoluintajn.*

*Dum la jaroj 1960-70 en Usono, kaj poste en Eŭropo, junuloj kontraŭstaris la proprumemon kaj provis starigi komunumojn, kie ne nur la materiala sed ankaŭ la seksa proprumemo estis forĵetata. Rapide malfacilaĵoj aperis, kiuj fiaskigis la plimultajn el tiuj eksperimentoj.*

*Ĉu do oni povas diri, ke proprumemo estas kronika malsano de la homaro aŭ ĉu ĝi estas necesa al la iniciatemo de la individuoj ?*

*Socio, kie ne ekzistus ia proprumemo estus sendube unuformigita, sen personecaj aspektoj, iom kiel granda kazerno. Proprumemo povas esti prava rajto posedi por si mem originalan domon, nekutiman vestaĵon, eĉ malgrandan proprajon !*

*La malsano okazas, kiam proprumeco donas povon al homo aŭ grupo ekspluati aŭ superregi la neposedantojn, kiel tio okazas ofte en la nuna socio.*

******************************************************************

La vidpunktoj de aliaj ĉenleteranoj, kun eventuale la opinioj de abonantoj legintaj tiun ĉi numeron, aperos en la januara "Laŭte!". Por venontaj debatoj per ĉenleteroj la red. de L! atendas enkonduko(j)n pri aliaj temoj. Ĉies kontribuoj estas bonvenaj.





# VORTOJ DE MALJUNULO

valo

## LA NEKONATA SOLDATO

*En 1921, kiam mi estis soldato en Versajlo, iun dimanĉon mi veturis trajne al Verduno. Mi piediris al la Pavimita Suburbo. Tie, sub griza ĉielo, meze de dezerta pejzaĝo kun stumpigitaj arbotrunkoj, viktimoj de la bombardadoj, etendiĝis vastega tombejo. Centoj, eble miloj da lignokrucoj vicigitaj en perfekta ordo. Unu el ili, ĝuste ĉe la plej proksima angulo, estis tiu de mia kuzo Fernando, mortigita en septembro 1917. En tiu tempo mi ankoraŭ oferadis al la kulto al kadavroj. Mi fidele ĝin observadis, ĝis Lanti komprenigis al mi ĝian plorinde ridindan absurdon.*

*El tiu sama tombejo, en 1930, oni elfosis la ok sennomajn ĉerkojn, inter kiuj juna simpla soldato, kiu partoprenis en la milito kiel volontulo, elektis unu. Tiu ĉi, transportita en Parizon, estis enterigita sub la triumfarko de la Stelo, la 11an de novembro, datrevenon de la armistico de 1918. Super ĝi, peza ŝtono kun gravuritaj vortoj : "Ĉi tie kuŝas nekonata franca soldato mortinta pro la patrio". Tie senĉese brulas flamo, simbolo de eterna memoro. Tie, ĉiun 11an de novembro kaj en kelkaj aliaj okazoj, la prezidento de la franca respubliko metas belegan multekostan florgarbon, dum klarionoj kaj tamburoj aŭdigas la funebran sonoradon al mortintoj. Kaj okaze de vizito en Parizo, ĉiu fremda ŝtatestro venas same kliniĝi antaŭ la tombo kaj honori per floroj la Nekonatan Soldaton.*

*Ĉu al tia gloro li aspiris ?*

*Mi imagas junan viron, plenan je forto kaj viva ardo, abrupte deŝiritan de sia paca ekzistado kaj brutale ĵetitan en la fajregon de la patriotisma frenezo. Verŝajne, kiel ĉiuj liaj kompanoj, li esperis reveni viva de tiu infero, kaj retrovi sian normalan vivon de paca civilulo. Eble li dorlotis projektojn por tiu feliĉa estonteco. Eble lin atendis edzino aŭ fianĉ-*

*ino, eble infanoj, probable ankaŭ gepatroj, ĉiuj en trema espero. En unu sekundo liaj kaj iliaj esperoj estis neniigitaj. La sorto decidis alie, kaj destinis lin al tiu postmorta gloro.*

*Post sepdeko da jaroj, kio restas nun el liaj ostoj, en tiu kavo sub la Triumfarko ? Kio restas el lia memoro, krom eble en la koro de georfoj, kiuj eĉ ne scias, ke tiu Nekonata Soldato estis ilia patro ?*

*Tiuj infanoj siavice forpasos, kaj sinsekvaj generacioj de praidoj rigardos malnovajn fotojn, dirante : "Tiu estis nia avo aŭ praavo mortinta en la Granda Milito". Kaj sinsekvaj generacioj da oficialaj klaŭnoj venos kliniĝi, kun floroj en la brakoj antaŭ la sennoma tomboŝtono de la Nekonato. Tio estas la Gloro.*

*11an de novembro 1984.*

## ĈU MI PROVU IOM METAFIZIKUMI ?

*Iuj homoj multe pensas pri la morto ĝenerale, kaj aparte pri sia propra morto. Ĉu konfesi ? Pri tiu temo mi nemulte zorgas, kvankam por mi la afero estas proksima.*

*Ĉiu surtera vivo ja finiĝas nature per la morto. Neevitable. Kaj en neantaŭvidebla tempo (krom eventuale per memvola plifruigo).*

*Sed, diros iuj, ĉu tiu finiĝo de nia fizika ekzistado estas vere fino ? Ĉu la animo (?) mortas kune kun la korpo ? Ĉu ĝi ne pluvivas ie, dum putras la kadavro ? Jen estas, miaopinie, nesolveblaj demandoj. Vi ne povos pruvi al mi la senmortecon de la animo, kaj mi ne povos pruvi al vi, ke ĝi estas mortema kiel la korpo. Do kial cerbumi pri tiaj demandoj, al kiuj neniu vivanto povas respondi ?*

*Pri tio tamen mi ne dubas. Se mia morto eble estos por mi la fino de ĉio, ne samtempe finiĝos la homaro. Se ĝi nur ne neniigos sin per freneza memmortigo, ĝi daŭros ankoraŭ longe plu. Longe plu homoj vivos, laboros, luktos, amos. Jen estas konsola certaĵo. Mi ne havos plu sensojn por tion konstati : kiel grave ? Mi scias, ke tiel estos, kaj tiu scio sufiĉas al mi.*

*Kelkajn jarojn plu, vivantaj konatoj memoros pri mi. Mi daŭre pluvivos en la memoro de miaj gefiloj kaj genepoj, ĝis ili siavice mem forpasos. Tiam okazos mia dua, definitiva morto. Ankoraŭfoje, kiel grave, je la homara skalo ?*

*"Mortis la reĝo. Vivu la reĝo !"*
*Mortis homo. Vivu la homoj !*

***Valo***



## 90-a datreveno de la fondo de C.G.T.

La 18an de septembro 1985 en Limoges (Limoĝo) sur la loko, kie okazis la fondo de C.G.T. (Ĝenerala Konfederacio de Laboro) oni inaŭguris la surmeton de rememoriga plato pri tiu evento. De la 23a ĝis la 28a de septembro 1895, la 7a nacia kongreso de la sindikataj unioj, korporaciaj grupoj, Metiaj Federacioj, Laborborsoj, kunvenis en Limoĝo. La 27an, laŭ propono de la organiza komisiono, la kongreso decidis la fondon de unueca organizo por ĉiuj laboristaj kaj oficistaj sindikatoj, kiu titoliĝis C.G.T. La efektivigo estis tamen malfacila, ĉar en la Federacioj la plimulto simpatiis al la socialistaj partioj de tiu epoko dum en la Laborborsoj la plimulto simpatiis al anarki-sindikatismo. Nur en 1906 en Amiens (Amieno) estis adoptita la Ĉarto, kiu pli bone difinis la bazajn doktrinojn de la Konfederacio, vigligis la depostulan agadon, firmigis kaj ampleksigis la organizon.

Tiu Amiena Ĉarto ĉefe reliefigis batalon por malapero de salajreco kaj mastreco, klasan batalon, necesan ĉiutagan agadon kontraŭ la kapitalismo, sendependecon de la sindikata organizo rilate al politikaj partioj.

Tiel la sindikatoj adoptis revolucian sintenon, kiu ne plu limigis la agadon al defendo kaj progresigo de la tujaj komunaj ekonomiaj interesoj, sed ankaŭ celis al anstataŭa socia sistemo, en kiu la sindikatoj akirus la produktilojn kaj sociajn riĉaĵojn kaj organizus kaj mastrumus la tutan socian vivon. Vere, tiu sinteno estis pli tiu de la anarki-sindikatistoj ol de ĉiuj sindikatanoj, sed ĝi kongruis kun tiu de la socialistoj, eĉ se tiuj estis pli favoraj al politikaj agado kaj rimedoj.

Tiu sinteno favoris unuiĝon kaj agadon de la sindikatoj kaj progresigis al pli bonaj vivkondiĉoj, al pli bona protektado per sociaj leĝoj. Tamen la politikaj tendencoj interbatalis por akiri la gvidajn postenojn kaj okazis, kiel en politiko, apartigo en plurajn sindikatojn. La plej granda malsukceso estis en 1914, kiam okazis la milito. Antaŭe oni parolis multe kontraŭ la militismo, la milito. Oni antaŭvidis ĝeneralan strikon por ĝin malebligi. Sed en tiu momento preskaŭ ĉiuj sindikataj responsuloj fariĝis patriotoj. Anstataŭ klasbatalo okazis kunlaboro.

Ĉu oni povas severe kondamni tiun sintenon ? Certe tiu milito estis imperialisma konflikto, sed ĉu sur internacia skalo la laboristaj organizoj estis kapablaj bone organizi kontraŭstaron ? Multaj opiniis defendi liberecon, demokration. Ĉu iun tagon la laboristoj estos kapablaj liberiĝi el naciismo

kaj organizi unuecan internacian agadon ?

Post la milito de 14/18 la komunistoj kaj kelkaj anarki-sindikatistoj fondis C.G.T.U. (Unuiĝa Generala Konfederacio de Laboro), kiu sin proklamis revolucia vid-al-vide de C.G.T. fariĝinta reformista ; naskiĝis eĉ aliaj labor-centraloj, kiel la kristana. Ĉar C.G.T.U. sekvis la komunistan politikon, okazis jen unuiĝo CGT-CGTU, jen denove apartigo. Nun C.G.T.-F.O. (Labora Forto) pretendas esti la vera heredanto de la malnova C.G.T. Tiu pecetigo de la laboristaj fortoj estas bedaŭrinda, kaj ankaŭ la malkapablo trovi efektivigeblan, anstataŭan soci-sistemon al kapitalismo.

**Jopo**

## ATENTU : ĝi baldaŭ alvenos !

Komence de 1986 oni denove havos, en ĉirkaŭaĵo de nia tero, Kometon de HALLEY.

**Kometoj.** Kometoj estas astroj, kies vojoj ĉirkaŭ la Suno estas tre long-formaj elipsoj. Ili kuntrenas longan luman strion, kun formo de vosto aŭ hararo (vd. PIV). Do ili proksimiĝas al Suno - kaj samtempe al Tero - kaj ili videbliĝas al ni. Ĉiujare deko da kometoj estas videblaj, plejofte per aparatoj. Kelkajn el ili oni bone konas de antaŭ jarcentoj dank'al ĉiniaj astronomoj. Poste ili malproksimiĝas en la spaco, kaj dum jarcento ili foriras ĝis nova reveno ĉe ni.

Malprogresemaj popoloj ofte kredis, ke tiaj alvenoj signifas grandan mal-ordon por teranoj. Certe la vosto riskas krei kelkan konfuzon ; oni diras eĉ, ke tiu povus esti kaŭzo de malapero de kelkaj loĝantoj el nia tero, ekzemple dinosaŭroj. Sed hodiaŭ oni pli facile dirus, ke bestoj aŭ plantoj malaperas ĉiufoje, kiam ilia medio ne plu konvenas al ilia vivmaniero. Kaj iliaj vostoj estas tre malproksimaj de ni.

Jam oni povas peraparate ekzameni **Kometon de Halley**, sed pli facile de la 15a ĝis la 30a de Marto 1986 oni povos vidi ĝin. Ĝi jam estis tre bone videbla de nia tero en 1910, kaj astronomo HALLEY, kiu ekzamenis ĝin en 1700 estis elektita kiel ĝia baptopatro.

Oni devas ankoraŭ memorigi, ke la **"stelo"**, kiu kondukis la tri reĝojn ĝis Jerusalemo, estis probable kometo.

Samtempe oni povas ankoraŭ proponi aliajn rendevuojn al interesatoj pri ĉielo : ĉiujare oni povas rendevui kun PERSEISOJ, la unuan dekkvinon de aŭgusto kaj kun Ĝemelidoj proksimume la 15an de decembro. Tiuj estas grupoj de **falsteloj**, kiuj revenas pli ofte ol la kometoj !

(Tio estas priparolo farita en Grésillon en aŭgusto 1985, okaze de ĉielobserva vespero)

**Paŭlo**



*Nia originala novelo :* **Hagen Hirte**

## KLAUS

*Ni sidas triope en bone flegata parko de ludileca urbo, jam de kvin minutoj. La hazardo venigis nin. Estas dimanĉo kaj ni volas ĝui tiun liberan tagon, tiun sunhavan, orbrilan kaj gajan. Ni venis aŭtostope. Ni faras nur paŭzon kaj la celo propra estas amiko loĝanta ĉe proksima vilaĝo.*

*Ni tre foras de la ensemajnaj aferoj kaj scivolas pri certaj gravaj respondoj. Ni havas demandojn ne fareblajn per tele-fono, demandojn, kiuj postulas bonan amikon.*

*Feliĉon ni havis ĝis nun. Ĉiam denove helpis iuj toleremaj aŭtomobilistoj kaj mi devis pensi pri la bibliaj birdoj el la montprediko, kiuj ja ne semas, kiuj ja ne rikoltas, kaj kiujn dio tamen nutras. Nu, ni ne posedas aŭton, sed tamen vetur-igis nin la kara dio.*

*Certe, tute normalaj ni ne estas. Surstrate ni bruis en fremda lingvo, kiun neniu ekster ni komprenas : Bonvolu plu iri, sinjoro, permesu, ke mi prezentas min, sinjorino. Ĉu ciga-redo forte venena agrablus, kara ino ? Nu, ni lernis Esperan-ton sur la strato, la dikfingron envente kaj la konversaci-libron enmane. Nun ni uzas niajn konojn en la parko ĉe la blankaj tabloj kaj seĝoj.*

*Ni tiom distancas al la ĉiutagaĵoj, ke oni devas timi pri nia tuja ekflugo al la blua ĉielo. Entuziasmaj konversacioj estas foje foje danĝeraj. Ŝvebante en tre edifaj pensoj, tremp-ite en la brilsunon, ni ĝuas rostitan kolbason kun terpomsalato. Jen montriĝas problemeto. Ni ne precize scias, kie la vizit-oto loĝas. Andreas sternas mapon, en kiu ankaŭ la vilaĝoj tridomaj havas lokon. Do, nenia danĝero ! Linda, Andreas kaj mi cerbumas, sed ne tro. Restas okazoj por vagaj rigar-doj. Baldaŭ ili ekgluiĝas al la najbartablo, ĉe kiu sidas juna kristano kun ekstermodaj okulvitroj. La surreversa plaketo montras lian konfesion. La kristano ŝvitas. Lian vizaĝon ka-dras barbo fajre ruĝa. Li paradas per nenia-mieno. Senmove li sidas kaj preskaŭ ne atentas nin. Apud li ridetas rulseĝisto, kies manoj strange kurbe superas la tablon. Penege li turnas la kapon al la mano, se li fumas la cigaredon.*

*Tio malagrable tuŝas nin. Fide al vi : La rulseĝisto ne kon-venas al la situacio. Sed ĉar ni estas en dimanĉohumoro, ni ankaŭ nun ne grumblas. Kial koncernu nin la rulseĝisto ? La rulseĝisto sidas apud sia tablo, kaj ni apud la nia. Tiel ĉio laŭordas, ĉu ne ? Niaj rigardoj denove cirklas. Kaj nun ni preskaŭ vere ĉielenflugas, sed Linda diras : "Mi havas*

*ideon !" "Hoho, ni respondas, "Linda havas ideon". "Jes, mi havas, kiel estus, se ni demandus al la kristano. Li certe konas la viron serĉatan."*

*La adepto de la krucumito ne konas lin, sed nun enmiksiĝas la rulseĝisto. Kun tordaj korpmovoj kaj zigzagoj en la vizaĝo li elpuŝas, ke tiu, kiun ni celas, loĝas en la proksima rulseĝisthejmo.*

*"Estas flegisto", li diras, "flegisto el la hejmo, jes ja."*

*Nun jen ! Tio konvenas. Post plia pridemandado li diras subite per agrable mola voĉo, ke li kunvenos, ke ankaŭ li volas tien. "Nu bone", respondas Linda por ni, kaj mi pripensas iomete kiel li venis ĉi tien. Estas klare, la kristano veturigis lin. Li do nin akompanos. Sed venis alie. Montriĝas, ke la junulo kunprenis la rulseĝiston helpe de tramo ĝis la parkstacio, ke li tute ne havas tempon, ke li estas tial tre danka al ni por la transpreno de la lasta vojpeco. Surprizite ni kapjesas. Poste la juna viro foriĝas lante inter la parkarboj.*

*Mi staras senkonsile apud la rulseĝo. Nur nun mi tute konsciiĝas, ke tiu ja ne per si mem ekveturos. Mi ekŝovas. Ni transiĝas la apudparkan straton. Linda kaj Andreas ridas pri miaj mallertaj stir-manovroj. Mi ŝajnsurdas kaj ŝovas per mieno kvazaŭ memkomprena, sed tre tre atente. La rulseĝo veturas frapante bone sur la ebena kaj glata strato. La rulseĝisto, kiu ne estas pli olda ol ni, alridas nin per siaj mokemaj okuloj. Videble li ne havas kaŭzon por plendi. Denove ni entuziasmas. La mondo estas ja bela kiel ĝi estas, ĉu ne ? La suno ĵetas varmajn kisojn kaj en la ĉielomaro naĝas blankaj ŝafetoj. Plu amikoj, plu amikoj, antaŭen !*

*Kvankam la veturilo tre bone antaŭeniĝas, ĝi trovas tamen obstaklojn je la flankstrataj eĝoj. Kvazaŭ ŝipestro la rulseĝisto ordonas kiel preteri la danĝerzonojn. Ankaŭ tio estas bela. Estas facile. Ĉio estas tiom facila. Linda prezentas nin. Kapkline la rulseĝisto diras : "Mi estas Klaus".*

*Ankoraŭ ni ne eliĝas el la urbo. La strato nun grimpas kaj grimpas. Tio jam ne estas tiom facila. Mi dividas la laboron inter Andreas kaj mi. Klaus parolas sperte pri sia movilo : "Tiom bona la rulseĝo ne estas. Ĝi emas iom dekstren." Pravas, mi pensas.*

*Antaŭ la urbo la strato denove glatas kaj ne plu grimpas. Bela tago tio estas ! Se ni ne estas la bibliaj birdoj, nu tiam ni certe estas gajaj migruloj. Kaj ankaŭ ni povus kanti : "Al kiu di' kun ĝoj' favoras, li tiun sendas tra la mond', kaj tiu mirojn ekadoras je kamp', river', arbar' kaj mont'..."*

*En la unue atingita loko vilaĝfesto ekis. Tio ja aspektas*



*granda. Monto-valo-veturejo, rajdokaruselo kaj budo por rostkolbasoj. Nu, kaj tuj apude pafbudo, por ke oni ne forgesu pri la granda arto mortigi la florojn. Ĝisĉiela biertendo kaj scenejo, sur kiu baldaŭ la stultig-industrio ekhurlos. Kaj estas ankaŭ librobudo por tiuj, al kiuj la alia ankoraŭ ne sufiĉe bonas. Nu do ! La librobudo estas prigluita per buntaj papilioj. Tio nepre indas. Per flankrigardo al Klaus ni efikigas liberan eniron. Ni permesas nur ion trinki, kaj tiam plu. Ni trinkas limonadon en la biertendo. Sed ne Klaus. Li jam trinkis lakton. Kaj tamen, kial li ne trinkas ion, fulmas tra mia kapo. La librobudo malfermas. Domaĝe ! Ni retiriĝas frate salutante al la kasistzono kaj repaŝas la straton.*

*Tie en la fono estas la horizonto. Ek do radoj kaj migrantoj ! Ek al la horizonto !*

*Linda plendas, ĉar ŝi ne rajtas ŝovi. Se estas tiel, sinjorino, bonvolu veturigi.*

*Linda ŝove ekmarŝas, sed jam post kelkaj metroj en akra vojkurbo karambolas vojrande. Ho ve. Linda ektimas kaj pete rigardas al ni. Nur Klaus-on tio gajigas. Post denova ekveturo li ŝercas al Linda :"Nu, sinjorino, ĉu vi eble volis ĵeti min en la stratfoson ?". Li palpebrumas, sed Linda paliĝas. Fine ni ridas kvarope kaj hurae pluas. Linda ŝovas kaj mi laŭtlegas el la konversaci-libro. Klaus demandas, ĉu ni eble volas iĝi interpretistoj. Sed tion ni neas.*

*Ni ruligas rulseĝiston al la rulseĝisthejmo. Ĉu ne estas grandioze ? Sed ne, ne tiom laŭdavide. Ni nur serĉas la flegiston.*

*Klaus proponas cigaredopaŭzon. Ni haltas kaj post lia peto ni prenas por li la cigaredojn el la dorsosako. Klaus insistas, ke ni fumu de liaj. Mi pensas pri tio, kia sento devas esti, se oni eĉ cigaredon ne povas fumi sen helpo. Mi ne povas imagi, sed respekto ekflagras en mi. Kiom da vivforto devas esti en Klaus.*

*Preskaŭ antaŭ la celo, ni tamen ne certas, ĉu estas la hejmo. La loĝinsulo troviĝas fore de iu vivsigno de civilizacio. La suno nun radias agresive kaj la ŝvito elpenetras el ĉiu haŭttrueto. Ĉu ni trovos la flegiston ? Klaus la unua ekkonas, ke estas la hejmo. Li montras al la ascenda platvojo de la eniro. Do, ni alvenis. Pli bone : Klaus alvenis. Baldaŭ algapas nin ne ĉiutaga kaforondo en la kulturĉambro. La aliaj rulseĝistoj jam kolektiĝis kiel la "ĉevaloj plej bonaj" de aŭtoklubo ĉirkaŭ la longa tablo. Ni ekscias, ke Klaus propre devis atendi je la tramstacio, kie ni ekŝovis lin. Atendas lin tiu flegisto, kiun ni serĉas. Li ĝis nun ne revenis. Ĉar ni venis tro malfrue, oni sidigis nin al ĉeflanka tablo. Multaj rulseĝistaj okuloj*

*brilas al ni, kaj plej prefere mi nun kaŝus min sub malvidiga masko. Sed tiu ja nenie en la mondo ekzistas. Andreas prenas por Klaus la trinktigon el la dorsosako kaj Linda antaŭmetas al li la kukon tiel, ke li perbuŝe pecon post peco povas deŝiri.*

***Hagen Hirte***

---

## AMASA VARBADO

*Nur unu fojon, se ci parolis pri libero,*
*Ekkoninte ĝin, salguston konservas ciaj lipoj.*
*Mi petegas,*
*Per ĉiuj vortoj, kiuj tanĝis la esperon kaj tremetas,*
*Iĝu, kiu paŝas sur la maro.*
*Al ni donacu la morgaŭan ŝtormon.*

*Nespertinte ĝojon pereas la homoj.*
*La ŝtonoj laŭvoje sopiras al levitacio.*

*Se Feliĉo forlasis ĉi mondon, ni ekiros ĝiarenkonten,*
*Logante ĝin per fabelaj manteloj de l' incendio.*

*Se vivo cia ekdormas,*
*Risku ĝin.*

Jean MALRIEUX
el Hectares de Soleil, 1953
tradukis Thérèse Pinet

## LIMERIKOJ (originalaj)

*Jen loĝis junul' en Milano,*
*surhavis li jakon el lano ;*
*eĉ en plena somero*
*kun la varm' de infero*
*li frostis en sia kabano.*

*Jen vivis knabin' en Seulo,*
*tre plaĉis al ŝi maldikulo ;*
*malklariĝis vetero :*
*la knabin' sen espero*
*lin perdis, ho ve, en nebulo.*

Daniel LUEZ

---



## KIO OKAZAS EN INSULOJ MARSHALL (MARŜAL), NORDA PACIFIKO

Jen la ĉefaj eltiraĵoj el parolado de iu virino de insuloj Marshall, kiu venis en Nederlandon komence de julio 1985.

"Ni, homoj de l'insuloj Marshall, vivas jam antaŭ la horo de la Tria Mondmilito. Ni travivis ĉiun etapon de atom-energia vetarmado : Usono perforte forloĝigis la homojn de Bikini kaj de Enewetak, por povi eksperimenti 66 nukleajn bombojn sur tiuj atoloj. La elprovoj forviŝis de la mondmapo 6 insulojn kaj lasis iujn aliajn danĝere poluciitaj de radiadoj.

(...) En 1946, la Usona Milita Komandantaro venis al Bikini kaj diris al la homoj, ke la sciencistoj de ilia lando elprovas la nuklean bombon "por la bono de l'Homaro kaj por la fino de ĉiuj militoj". La ĉefo de Bikini ne ĉion komprenis, sed unu vorto restis gravurita en lia menso. Tiu vorto estis "Homaro". Li pensis, ke la Homaro iel rilatas kun Dio, kaj li diris : "Se la elprovoj estas la volo de Dio, do mi lasos miajn homojn foriri."

La elprovoj finiĝis en 1958. La homoj de Rongelop kaj multaj aliaj Marŝalanoj suferis pro multaj sanproblemoj, kiuj plu kreskas nuntempe : tiroidaj tumoroj, leŭkemioj, katarak-toj, abortoj, mortnaskitaj infanoj.

La Marŝalanoj nomas tiujn bebojn "meduzaj beboj". La bebo naskiĝas sur la akuŝtablo, spiras kaj moviĝas. Sed ĝi ne as-pektas kiel homa estaĵo. Ĝi similas al gelatenmaso. Tiuj beboj vivas nur kelkajn horojn. Kelkfoje, ili naskiĝas kun elkresk-aĵoj sur la kapo, similaj al kornoj. Iuj aliaj havas 6 man- aŭ pied-fingrojn.

Mi kreskadis en la Nordaj Insuloj, sub la vento de Bikini kaj de Enewetak. Mi estas dufoje operaciita por forĉizi tumor-ojn. Mi ne konas ilian kaŭzon sed, kiel multaj virinoj de l' Marshall, mi timas la estonton, kaj kio okazos kiam mi naskos infanojn.

La usonaj kuracistoj observas nin ĉiujare kaj diras al ni, ke ni ne maltrankvilu, ke nia sano estas bona. Tiuj kuracistoj neniam komunikis al iu ajn la rezultojn de tiuj observoj. Sed ni ne bezonas sciencistojn por scii, ke ni malsanas.

Tial ni serĉas kuracistojn por nin kuraci, kiuj estu sendepen-daj de la registaro.

La Usonanoj diras al ni, ke ili "ĉeestas por nin protekti". Sed nin protekti kontraŭ kiu ? Ni ne havas malamikojn. Cetere, ne ekzistas vorto en nia lingvo por signifi "malamiko".

(...) Mi venis ĉi tien, ne kiel turisto, sed ĉar **mi fidas je vi**"

DARLENE KEJU-JOHNSON

## Propono de kampanjo por SENDEPENDA KURACA HELPADO

1. Kontakti la internaciajn organizaĵojn, la homojn kaj la informrimedojn, povantajn aliĝi al la kampanjo.
2. Serĉi kuracistojn pretajn iri al Insuloj Marshall por tie fari observojn. Tiu kuracista skipo sciigu la buroon de la kampanjo pri la financaj bezonoj (vojaĝ- kaj restad-kostoj). Por tio ili interkontaktiĝu. Kolektado de la necesa mono.
3. La kuracista skipo komuniku al la buroo de la kampanjo financan taksaĵon pri la necesa sumo laŭ la rezultoj de iliaj observoj, por la surlokaj kuracadoj kaj eventualaj forloĝigoj.
4. Kolektado de la mono necesa por la kuracadoj.

NI ATENDAS VIAJN SUGESTOJN, KRITIKOJN... KAJ VIAN HELPON !

Venonta informbulteno en oktobro, kun adresoj de naciaj kontaktejoj, listo de subtenoj, ktp.

Tiu letero foriris al Francio, Britio, Svedio, Belgio, Nederlando, Svisio, Usono, Japanio, Aŭstralio, Novzelando, kaj multaj aliaj landoj. Ĝi direktiĝas al pacmovadoj, revuoj, gazetoj, aktivuloj... sed ĉefe al miloj da patrinoj kaj patroj, al miloj da estontaj gepatroj. Ni povas diri al Darlene kaj al la Marŝalanoj, ke, baldaŭ, ili ne plu timos, kio okazos al iliaj beboj.

Mi kredas ankaŭ je vi.

Pĉk 4196 87 R NANTES
al nomo de D. MAINGUY
menciu "Marshall"
en la kadro por korespondado.
(informaĵo ricevita fine de julio 1985)

Didier MAINGUY
Les Hautes-Faux
BOISSIERE DU DORE
44430 LOROUX BOTTEREAU
tel. 40 36 25 96

---

## HOMARANISMO REVIGLIĜAS

En julio 1985 fondiĝis la Homarana Asocio (HA), kiu volas studi, instrui kaj disvastigi la homaranismon. Homaranismo estas aŭtentike esperantisma humanismo. Zamenhof karakterizis ĝin jene : "Lingvo internacia havas la celon, krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri." Zamenhof siatempe ne sukcesis ĝenerale akceptigi la homaranismon : Nek forme, nek enhave ĝi sufiĉe konformis al la intelekta gusto de liaj samtempuloj. Modernaj sociaj tendencoj kaj sciencaj ekkonoj favoras revizion de la siatempa malakcepto. Ŝajnas sukcespromese, reformuli la homaranismon konforme al la postuloj de la nuntempo.
HA volas do science trakti la homaranismon kiel "teknologion pri la konstruado de intelektaj kaj emociaj pontoj". Ĉiuj sciencoj pri la psiko kaj la konduto de la homo estas ĝiaj helpsciencoj.
Krome HA volas esti hejmo interalie de tiuj homoj, kiuj interesiĝas pri la religiaj tendencoj de la homaranismo kaj/aŭ pri la homaranismaj tendencoj de la religioj. Tamen tiu interesiĝo tute ne estas deviga por la membroj de HA.
HA deziras kunlabori kun ĉiaj esperantistaj kaj humanismaj organizaĵoj, kompreneble ankaŭ kun UEA. Ĝi agnoskas, ke UEA deziras resti esperantista (en la malpli vasta senco de la vorto), ke ĝi ne povas fariĝi homaranisma : Ĝuste en tio kuŝas la ekzistorajto de aparta homaranisma organizaĵo.
Laŭ enketo ĵus farita de Info-Servo, minimume 30 procentoj de la esperantistoj interesiĝas pri homaranismo. Ili povas peti detalajn informojn de Homarana Asocio (adreso : Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, F.R.Germanio).

---

**Anonco** : Celante, pere de esperanto, ebligi la komunikadon inter la laboristoj de la diversaj firmaoj "Neiman" tra la mondo, mi ŝatus scii, ĉu SAT-anoj laboras en tiu multnacia societo, kies aliaj nomoj ankaŭ estas : "Signal Vision (F) - Klakson (GB kaj D) - Clasor (E), aŭ, eventuale, najbaras unu el tiuj firmaoj. Mia ideo estas, ke tiuj povus mem fariĝi perantoj por tiu interkomunikado. Bonvolu respondi al : Tereza SABATIER, 21 rue Pasteur, F 94490 ORMESSON.

---

Juna esperantisto planas biciklan vojaĝadon tra la mondo por diskonigi pacon, puran naturon kaj Esperanton. Li atendas gastajn helpojn de ĉiuj. Aleksandro CARNEIRO, Str. São Vicente de Paŭlo, 5/N, Santa Barbara, Bahia, Brazilio

---

## TUTMONDE
## pacifista movado

Sekretariado : Apartat 313, TERRASSA, Hispanio. Tel. 788.4633

### KIO ESTAS "TUTMONDE" ?

TUTMONDE fondiĝas en la unuaj tagoj de januaro de 1985, post la aprobo de la Statuto.
TUTMONDE havas kiel unikan celobjekton la starigon de kunordigita tutmonda pacifista movado por kontraŭstari al ĉia perforto, al la monda milito, al la lokaj militoj, al la disdividiĝo de la mondo en militajn blokojn kaj al la nuklea aŭ ordinara armilkonkuro.
TUTMONDE naskiĝis de komuna interkonsento inter diferencaj grupoj humanismaj kaj esperantistaj el diversaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko, kaj, konsekvence, ĝi komenciĝis per inica vitaleco, kiu garantias ĝian futuran kreskon.
TUTMONDE sin artikigas pere de Lokaj, Naciaj kaj kontinentaj Delegacioj, kies tasko estas la kunordigo de grupoj kaj personoj, kiuj deziras, ke estu atingita tutmonda pacifista movado, kiom eble plej ampleksa.
TUTMONDE ne pretendas starigi agadojn el publika karaktero. Ĝiaj Delegacioj

sole havos kiel celon helpadi la Grupojn kaj ties membrojn aŭ simpatiantojn, kiuj cetere povos tute libere organizi pacifistajn aktivaĵojn, kiam kaj kiel ili kredos tion konvena. La Delegacioj nur faciligos informadon kaj la necesan komunikadon por kunordigi la pacifistan tutmondan movadon.
La aliĝintoj, simpatiantoj kaj Grupoj enskribitaj en TUTMONDE ne havos la devon kotizi ion ajn. La helpaj donacoj por la enspezoj de la organizaĵo havas laŭvolan karakteron.
TUTMONDE sin gvidas per Statuto, kiu estis aprobita en Decembro, 1984. En ĝi estas determinitaj la starigo de Sekretariato kaj Delegacioj, cele kunordigi unuece la senton de la enskribitaj simpatiantoj. La decidaj aranĝoj restos je la respondeco de la aliĝintaj pacifistaj Grupoj.
La pacifistaj Grupiĝoj enskribitaj en TUTMONDE povas esti de karaktero internacia, nacia aŭ loka. La internaciaj Grupiĝoj kontrolos la Sekretariaton ; kaj la naciaj kaj lokaj, kontrolos la Delegaciojn de sama karaktero.

---

## AMNESTIO INTERNACIA intervenas kontraŭ ekzekutoj de neplenaĝuloj en Usono

Sekve de la antaŭviditaj en ŝtato Teksaso ekzekutoj de malliberuloj kondamnitaj pro krimoj faritaj antaŭ la aĝo de 18 jaroj, Amnestio Internacia deklaris ĵaŭdon 1985/09/05, ke tiuj ekzekutoj estas okulfrapa atenco kontraŭ la internaciaj minimumaj garantioj antaŭviditaj de diversaj konvencioj aŭ rekomendoj de la Unuiĝintaj Nacioj.
A.I. petis, ke ne okazu la ekzekuto de Charles RUMBAUGH, kiun letala injekto devus mortigi la 11an de septembro 1985.
Laŭ scio de A.I., almenaŭ 33 personoj (inter kiuj ok en Teksaso) riskas ekzekuton pro krimoj faritaj, kiam ili estis neplenaĝaj.
Iliaj ekzekutoj kontraŭus la internacian pakton pri civilaj kaj politikaj rajtoj, la amerikan konvencion pri homaj rajtoj kaj la rekomendojn de la ekonomia kaj sociala konsilantaro de UNO. Usono subskribis, sed ne ratifikis, la pakton kaj la amerikan konvencion.
A.I. memorigas, ke dum la pasintaj 12 jaroj, inter la 70 landoj, kiuj transdonis informojn al UNO, unu kondamnito, en Barbadoso, estis ekzekutita pro krimo farita antaŭ la aĝo de 18 jaroj.
La organizacio sendis en julio 1985 leteron al la guberniestro de Teksaso, Mark White, memorigante la internaciajn regulojn, laŭ kiuj la mortpuno ne aplikeblas al personoj, kiuj je la epoko de la riproĉitaj faktoj ne atingis la plenaĝon.
"Kiel ajn estas la krimo", aldonis A.I., "apliki al juna persono la plej kruelan punon, tiel malebligante ĉian eventualan plibonigadon, kontraŭas la principojn de justeco kaj homeco".
A.I. substrekas ke, eĉ se la aĝo de la maturiĝo povas konsiderinde varii, tamen la aĝo de 18 jaroj, difinita per la internaciaj paktoj, estas minimuma aĝo agnoskita de la internacia opinio. Kelkaj landoj difinis eĉ pli altan aĝon.



Charles RUMBAUGH estis kondamnata en 1980 pro murdo, kiun li faris dum domŝtelo, aĝante 17 jarojn. La 15an de aŭgusto, Jay PINKERTON, alia teksasa malliberulo, ricevis prokraston 20 minutojn antaŭ sia antaŭvidita ekzekutiĝo, ĉar la apelacia kortumo akceptis ekzameni lian apelacion.
A.I. ankaŭ petis de guberniestro Mark White, ke li ŝanĝu ĉiujn mortpunojn deciditajn en Teksaso, asertante, ke la reenkonduko kaj plimultigo de ekzekutoj en tiu ŝtato kontraŭas la spiriton de la 4a artikolo de la amerika konvencio pri homaj rajtoj, kiu mencias, ke la mortpuno ne estos reenkondukata en la ŝtatojn ĝin aboliciintajn.
A.I. oponas la mortpunon je ĉiuj kazoj, ĉar ĝi konsideras ĝin atenco kontraŭ la vivrajto, kaj kontraŭ la rajto ne suferi punon aŭ trakton kruelan, malhomecan aŭ malnobligan, tian, kia mencias ĝin la universala deklaracio pri homaj rajtoj.

Noto : Charles RUMBAUGH ekzekutiĝis kiel antaŭvidite. Li rifuzis subskribi lastan apelacion, opiniante, ke li jam sufiĉe suferis per la atendado, kaj ke li ne volas plu vivi.

---

## POR NOVA ESPERANTO-OAZO

Mi ne volas florojn sur mia tombo
aŭ en iu ajn imaga Paradizo,
sed dum mia vivo
kaj sur nia planedo.

Justo

Sub la nomo "Esperanto-Oazo" mi konstruis kaj administris en hispana kamparo domon kaj kampadejon por Esperantistaj gastoj. Tiu nomo estis dusence elektita, lingve kaj naturamike, ĉar mi intencis krei ne nur lingvan sed ankaŭ belan naturan hejmon.
Unue mi pensis starigi dometaron kvazaŭ malgrandan kernon de estonta Esperantio : dekon da bangaloj por luigi ; ĉefan domon kun biblioteko, lernoĉambro, dormoĉambroj, manĝejo, trinkejo ; naĝejon kun sunvarmigita akvo kaj parcelojn por kampadi. Pro manko de financa kaj alispeca kunlaboro, mi estis devigata malgrandigi la projekton - ĝis nura kampadejo kun domo - kaj realigi ĝin tute sola. Ĉiujare mi havis la esperon krei grupeton da diversnaciaj gesamideanoj, kiuj pli-malpli konstante restus ĉe mi kaj kunlaborus por la bona evoluo, pligrandigo kaj plibonigo de la entrepreno. Bedaŭrinde mi ne sukcesis atingi tiun celon, kaj post 4 jaroj mi devis forlasi la aferon. Preskaŭ ĉiuj gastoj riproĉis al mi, ke mi ne sufiĉe propagandis ĝin.
Ekde 1 jaro mi vivas nun denove en granda urbo, en la

t.n. civilizo, enspiras la aŭtogasojn, suferas pro la bruego de la aŭtomotoroj, loĝas en malgranda ĉelo de granda konstruaĵo kvazaŭ abelo en abelujo kaj kontribuas per grandparte stultiga laboro al la riĉiĝo de iu komerca entrepreno.
Same kiel mia amiko Justo, mi ne volas atendi ĝis mia morto por havi florojn, nek deziras vivi ĉiam en nehumanaj kondiĉoj.
Tial mi serĉas gesamideanojn, kiuj kune kun mi volas konstrui novan daŭreman Esperanto-Oazon (E-O).
Jen la principaj bazoj de mia projekto :
- Ekologio staras antaŭ ekonomio.
- Esperanto estas nia oficiala lingvo, sed ni akceptas ĉiujn geverdulojn kiuj volas lerni ĝin.
- En la E-O regas amo kaj racio, kaj ne havas spacon la kruel-eco, kiu jam speguliĝas en la stulta germana proverbo "ĝoji pro alies malfeliĉo estas la plej granda ĝojo". Ni ne volas nome esti ŝajne feliĉaj je la kosto de aliaj, sed vere feliĉaj kune kun niaj gesamideanoj.
- Ni penos eviti la maljustojn kiujn suferas kutime la virinoj, kaj ni aspiros disdoni la taskojn kaj decidrajtojn ĉiam duone inter virinoj kaj viroj.
- Sur la tereno de la E-O rajtos veturi nur senbruaj veturiloj, kiel ekzemple bicikloj kaj elektraj aŭtomobiloj. Esceptoj, nur kiam ili ne estas eviteblaj.
- Fumi en la E-O estas konsiderata kiel agresa ago kontraŭ la kunloĝantoj kaj la naturo.
- Ĝenerale, neniu ĉe ni kulpas pri via malfeliĉo ; la responsuloj regas ekstere. Lasu do vian agresemon antaŭ nia pordo kaj estu en nia hejmo pacema, amema kaj aminda.

*

Ekonomie povas ekzisti du enspezofontoj en la E-O : unuflanke el la luigado de ĉambroj kaj parceloj ; aliflanke el la kontribuo de mecenatoj, finance fortaj geverduloj kaj gepensiuloj kiuj volas loĝi ĉe ni por longa tempo aŭ por ĉiam.
Konvena lando por starigi la E-On povas esti Francio. La loko estu neindustria kaj nature bela. Granda bieno kun renovigendaj konstruaĵoj en akvo- kaj laŭeble sunoriĉa regiono estus taŭga.
Se ni ne trovas pli simplan solvon por aĉeti la terenon, ni povus apliki la modelon kiu estas uzata nuntempe en FRG por fondi la ekologian "Ekobanko"-n :
La E-O estos kooperativo. Ĝia kapitalo konsistas el la partoj, kiujn ĝiaj membroj akiris. Por aniĝi oni devas aĉeti minimume 1 parton (ĉe Ekobanko tio estas 100 GM). Ĉiu membro



havas 1 voĉon, sendepende de sia kapitalparto.
Dum la unua fazo, ĝis la starigo de la E-O, ni fondos E-O-amikaron, kies tasko estos informi pri kaj propagandi la projekton. Baza kondiĉo estas atingi sufiĉan kapitalon por aĉeti taŭgan bienon.
Por ne fari tro longa tiun ĉi unuan informon, mi donos pli da detaloj en venontaj artikoloj.
Diference de la Ekobanko, la Esperanto-Oazo estos nur je la dispono de siaj membroj kaj ties amikoj, pri kiuj responsas la invitinta membro. Tio signifas, ke ĝi ne estos hotelo aŭ publika kampadejo, ĉar ni en tia kazo ne povus determini la aspiritajn vivkondiĉojn sur nia propra tereno.

Tio ĉi estas la unua paŝo por starigi verdulan hejmon. Viajn ideojn, sugestojn kaj proponojn bonvolu sendi al la suba adreso : Akiles SANZ, Hafenplatz 6, Ap.206, D 1000 Berlin 61 Tel.: 261 74 06.

---

## LABORRENKONTIĜO EN SÈTE

De la 15a ĝis la 22a de septembro, kvin ĝirondianoj partoprenis en feri-semajno en Sète. Kiel la pasintajn jarojn ili trovis tre amikan etoson kaj agrablan fruktodonan laboron. La ĉeestintoj povis elekti inter tri kursoj : S-ino Turin kompetente gvidis la unuan (tri lernantoj sukcese trapasis la unuagradan ekzamenon) ; kelkaj ĝirondianoj partoprenis la kurson de S-ro Tyblewski, pola profesoro, kiu instruis laù psikologia metodo tute nova kaj iom stranga por mi, sed tre espriminstiga ; la aliaj studis "Paŝojn al plena posedo", gvidate de S-ino Vincent. Ni ne rajtis paroli franclingve, ĉar ĉeestis ankaù diverslandanoj : pola, usona, germana kaj eĉ japana.

Studi matene kaj parte posttagmeze, ferii intertempe : bani sin en la maro tute proksima, promenadi, ĝui la belan veteron, kune pasigi agrablajn vesperojn per kantoj, ludoj, teatraĵoj, lumbildoj ktp : jen la programo de tiu tro mallonga periodo.

Dankegon al la esperantista grupo de Montpellier kaj precipe al S-ino Vierne, kiu organizis kaj animis tiun semajnon por kvindeko da esperantistoj.

Ĝis la venonta jaro, eble en alia loko, en la proksimeco de Thonon.

**Rose**

---

## EN ĜIRONDIO... NIA VIVO

Nia unua kunveno, post la somera libertempo, okazis ĉe nia kdo Michel Lavergne en IZON, la 7an de septembro, posttagmeze.

Pri propagando, ni parolis...

Ni konsentis aliĝi en CLIA (Interasocia Komitato), kiu zorgas pri la forumo de la Asocioj. Venontjare tiu forumo okazos

en Bordeaux-Lac ; la kosto estos 500 F por ekspozicii dum 2 tagoj.

Ni cerbumis pri pli moderna kaj alloga materialo por propagandi per E-budoj.

Pri nia E-biblioteko en Cenon...

Milu preparis kaj disdonis flugfoliojn por sciigi pri la pruntedonotaj libroj.

Blanka novaĵo.. Nia amiko Marcel Redoulez edziĝis, komence de aŭgusto en Cenon. Estas nova esperantista paro, ĉar la edzino, Ursula, estas germanino kaj esperantistino. Pluraj kamaradoj el nia grupo ĉeestis la oficialan ceremonion en la urbodomo de Cenon. Oni petis de Leo Robert, ke li traduku la oficialan legadon (Civila Kodo) kaj la tradiciajn demandojn de la urbestrino al la geedzoj.

Neantaŭvidita okazo por propagandi nian lingvon !

Esperanto-budo ĉe la socialistoj ! Ni deĵoris ĉe budo dum la festo de la Socialista Partio, la 15an de septembro en Cenon. Kelkaj vizitintoj faris demandojn.

Venonta kunveno en nia sidejo en Cenon-Palmer, la 22an de oktobro, je la 19a.

---

## ESPERANTO-FAKO DE LAIKA AMIKARO EN EYSINES (Ĝirondio)

Raporto pri la diversaj agadoj :

* la 31an de majo : deĵorado de E-budo okaze de la lernej-kermeso.
* de la 1a ĝis la 6a de julio : E-Piedmigrado en Lozère. Partoprenis 13 personoj (7 neesperantistoj, 6 esperantistoj)
* komence de septembro : por anonci la rekomencon de la kursoj okazis : gluado de afiŝoj, artikolo en "Sud-Ouest"-gazeto, anonco en radio "Bordeaux-Gironde"
* oktobro : 10 personoj sekvas la kursojn.
* la 12an de oktobro : kun la ĝirondia grupo akcepto de pola esp-isto S-o Tyblewski en nia nova loko "la Roseraie". Aperigo de artikoloj pri Esp. en la gazeto de la laika amikaro kaj en "Flash" (urba bulteno).
* la 26an de oktobro : kadre de la Internacia Junular-Jaro, ni partoprenis en la Kultura Centro de St Médard-en-Jalles en ekspozicio de libroj pri diversaj temoj.
* de la 19a ĝis la 23a novembro : en la urba biblioteko, ekspozicio de libroj en franca kaj esperanta lingvoj. Laŭvice ni deĵoros.

Ginette

---

## ĈE SAT-BROŜURSERVO :

Ĵus elĉerpiĝis : **Esperanto in 24 pages** (angla) ; **Pri la esperanta literaturo** (R. Laval) ; **Abrégé pratique de grammaire esp.** (Lentaigne). Do, momente ne eblas liveri tiujn broŝurojn. Informo aperos en L!, kiam okazos reeldono.



# Ĉies voĉo

## PRI VOLUPTILMUTILADO

*Mi ne konis ĉi tiun aferon, ĝis mi legis la enkondukon far Ĝiz en 62-a "Laŭte!".*

*Kompreneble, kiel eŭropano, mi konsideras tion sovaĝaĵo, sed nur rezulto de malklereco. (Oni povas vidi en la tuta mondo tiujn rezultojn pli-malpli sovaĝajn). Ĉu tiuj homoj (viroj kaj virinoj) konsideras la klitoron malbona ? Ĉu iliaj moro kaj moralo konsideras ĝin malsaniga (maldeciga, pekiga...) ? Ŝajnas, ke jes. Mi imagas ilian prarezonadon : "Se ni lasos al niaj filinoj ĉi tiun organon, neniu volos iŝin; kiu volos virinon kun emo (aŭ pli bone dezirkapablo) fikati?". Kompreneble iu povas diri, ke en okcidento ĉiuj virinoj kunportas siajn klitorojn, kaj ne fikatas ĉiu-kaze aŭ ĉiu-momente kaj iŝiaj edzoj ne pensas, ke iŝi "perfidas" ilin, ĉar iŝi havas ĝin ; kaj tiuj pravas : "en okcidento", ĉar ĉi tie la rilatoj viro-virino estas pli sentimentalaj, spiritaj, intelektaj, egalecaj, kia estas la maniero kredi plenan fidelecon kaj stabilan paron ; sed en tiuj popoloj, kies viroj konsideras virinojn plia posedaĵo, ne eblas akiri tiun stabilecon ; do la viroj fidelas nur pro timo "uzi" alies edzinon (timo al reago de tiu alia), kaj la virinoj pro la voluptokapablomanko (se iŝi estus hundoj, sufiĉus manĝigi iŝin ; sed tial, ke iŝi estas homoj, do plej superaj kaj komplikaj estaĵoj, necesas pli drasta ago).*

*Konklude, ĉi tiu sovaĝaĵo, pri kiu ni debatas, estas rezulto de virinsubpremado (unue viroj pensis, ke iŝi estas posedaĵoj, kaj poste agis tiel), ne male. Do post malaperigo de voluptilmutilado ne malaperos virinsubpremado.*

*Aliflanke, malgraŭ la "moderniĝo" de tiuj popoloj, sendube nun la afero jam estas morala kaj religia, do malfacilege ŝanĝebla. (Tion mi konstatas en Hispanio, kie mi loĝas, kaj kie estas tre malfacile ŝanĝi la katolikaĉan reakcian hipokritan moralon, malgraŭ ke temas pri "okcidenta ŝtato"). Antaŭ ol provi konvinki ilin pri tiu eraregа ago, mi preferas provi konvinki ilin pri ilia erara religio (estu ĝi kiu ajn).*

*Fine mi ne komprenas, kial la katolika eklezio ankoraŭ ne pensis pri ĉi tiu taŭgega solvo kontraŭ la virinaĉa pekemo, kiu pekigas virojn ; eble se la papo vivos sufiĉe...*

*(Mi opinias, ke nia iea amiko pravas rilate la periodujon).*

-------------

## KVADRATURISTE VIA.

Ĉu mi bezonis refuti la tezojn prezentitajn de K-do Valo ? Tian bezonon mi vere ne eksentis. Ĉu K-do Valo mem ne diris, ke ni parolas pri malsamaj aferoj ? Do, kial mi provus refuti tezojn sen rilato kun mia propra temo ?

Cetere, sufiĉas ekscii, ke, laŭ la teoremo de Pitagoro, la diagonalo de kvadrato estas "strekebla sed ne mezurebla", por tuj kompreni, ke tiu teoremo similas al la paradokso de la samepoka greka filozofo Zenono, kiu demonstris per verŝajniga rezonado, ke rapida sageto neniam trafos malrapide kurantan celaton. Tamen nepre konstatendas, ke, en praktiko, la sageto trafos la celaton, kaj ke diagonaloj ĉiumomente estas mezurataj en la tuta Mondo per simplaj sed precizaj mezuriloj. Kiu do pravas ? Ĉu la arbitraj elpensitaĵoj de filozofoj-matematikistoj ? Ĉu la faktoj mem ? La teoremo de Pitagoro, laŭ kiu la diagonalo estas strekebla sed ne mezurebla estas la tipo mem de tiuj arbitraj elpensitaĵoj. Ĝi malpravas pro tio, ke ĝi konsideras la kvadraton dise de la cirklo, kaj pretendas per arbitra procedo determini la rilaton inter la diagonalo kaj la latero de kvadrato. Kaj, ĉar la procedo fiaskas, anstataŭ rekonsideri ĝin, oni dogmigas kaj tabuigas ĝin, mortigante tiujn, kiuj publike aludas pri ĝi. Tiel estis mortigita Hippasos far la pitagoranoj mem. Laŭ sama pseŭdologiko oni demonstras hodiaŭ, ke Esperanto ne povas taŭgi kiel tutmonda interkomprenilo, kvankam ĝi estas tutmonde uzata en ĉiuj fakoj de la socia vivo.

Tamen, de jarmiloj estas tutmonde instruata, ke "la diagonalo estas strekebla sed ne mezurebla". Tio daŭras ankoraŭ nuntempe, kiam Einstein pruvis per sia fama formulo $E = MC^2$, ke la materio kaj la energio estas sama afero. Ankaŭ sama afero estas la cirklo kaj la kvadrato. Ili nedisigeble kunekzistas unu en la alia, kaj provi konsideri ilin aparte, nepre kondukas al neprecizaj kaj erarigaj konkludoj. Tion demonstras simpla konfrontado de la rezultoj ricevitaj per kalkuloj faritaj helpe de la empiria nombro PI 3,1416, kaj de la racionala PI 3,1406. Necesas nur bonvoli provi kaj kompari.

Kalkulante per PI 3,1416 la surfacon de cirklo, kies diametro estas 15,8 la rezulto estas :
(7,9 x 7,9) x 3 = 196,067256.
Per la racionala PI 3,1406 la rezulto estas :



(7,9 x 7,9) x 3,1406 = 196,004846.
Por la cirkonferencoj la rezultoj estas :
15,8 x 3,1416 = 49,63 por la unua kazo kaj :
15,8 x 3,1406 = 49,62 por la dua kazo.

Laŭ ambaŭ kazoj la surfaco de la cirklo ekvivalentas tiun de kvadrato, kies latero estas 14 x 14 = 196, kun iom da troo por la unua kazo, kun precizeco je dekono, ĉar temas pri surfaco, por la dua. Sed se oni aldonas decimalojn por ke la rezultoj estiĝu pli precizaj, oni tuj konstatas, ke la ioma troo de la unua kazo ne malaperas kaj restas proksimume la sama : (7,9 x 7,9) x 3,14159195 = 196,0667535995, dum la precizeco fariĝas praktike senfina por la dua :
(7,9 x 7,9) x 3,14052235218714349 52732 =
196,00000000000000000000412, t.e : precizeco je almenaŭ dekono de miliardono de miliardono. Do, la ioma troo de la unua kazo fontas el la neprecizeco de la empiria PI 3,1416. Necesas substreki, ke la precizeco kutime postulata en mekaniko estas je centono ; kaj je milono por la plej preciza.

Sed, oni eble obĵetos, el kia ĵonglista ĉapelo vi ĉerpis tiujn oportunajn decimalojn ? Nu, por la unua kazo, el la artikoleto, kiun K-do Paŭlo verkis gratule al K-do PMG, laŭdante lin pro la ega precizeco de lia procedo. (L! n°53). Por la dua kazo, el la divido de la kvadrata surfaco per la kvadrata radiuso ($R^2$) de la samarea cirklo :
196 : (7,9 x 7,9) = 196 : 62,41 = 19600 : 6241 = 3,1405223...
ktp. Ĉar la diametro de la cirklo estas 158, kaj la latero de la kvadrato 140, la rilato inter ili do estas : 158/140 aŭ 79/70 aŭ 7,9/7 kaj reciproke 7/7,9, kaj PI 3,1406 estas la preciza rilato inter la surfacoj de la cirklo kaj de la kvadrato same kiel inter la diametro de la cirklo kaj la perimetro de la kvadrato.

Pri la rilato inter la latero kaj la diagonalo de kvadrato, mi bonvoleme konsentas kun K-do Valo, ke, kiel ĉio empiria, ekzemple PI 3,1416, ĝi ne estas tre preciza. Mi uzis ĝin precipe pro tio, ke ĝi plifaciligis miajn perfingrajn kalkulojn, kaj ne modifas la rilaton inter la cirklo kaj la kvadrato. La preciza rilato fakte estas 7/9,905. Ĝi devenas de la diferenco de longecoj inter la kvadrata perimetro kaj la cirkla cirkonferenco. Ĉar se ĉiu diagonalo profitas entute la kvar mallongiĝojn de la medianaj radiusoj, t.e. : (0,9 x 4) x 2 = 7,2, la longeco de la cirkonferenco devus esti :
(14 x 4) = 56 - 7,2 = 48,8, kaj ĝi efektive estas 49,62. La diferenco inter ili : 49,62 - 48,8 = 0,82 devenas de la "manko" inter la punktoj J kaj Z de ĉiu duondiagonalo. (Oni bonvolu

sin turni al la cirklokvadratura skemo en L! n°61). Por cirklo kun diametro 15,8 la "kompletigo" de tiuj "mankoj" necesigas por ĉiu duondiagonalo : 0,82 : 4 = 0,205 de la plilongiĝo, kaj, por unu diagonalo : 0,205 x 2 = 0,41. La tuta diagonalo konsistas do el : 15,8 (diametro) + 3,6 (kvar plilongiĝoj) + 0,41 (aldono de la cirkonferenca rektiĝo) = 19,81. La rilato inter la latero kaj la diagonalo do estas 14 (latero) sur 19,81 (diametro) = 14/19,81 = 7/9,905, dividebla de 10 kaj 7.

La teoremo mem de Pitagoro pri la kvadrato de la hipotenuzo pravigas tiun rezulton. Ĉar se tiu kvadrato "egalas tiujn de la du aliaj lateroj", kaj se tiuj lateroj estas 7 kaj 7, la longeco de la hipotenuzo (diagonalo) estas : (7 x 7) + (7 x 7) = 49 + 49 = 98 $\sqrt{9,904}$ kun reziduo. La J.Ŝ.-a procedo siavice pravigas la Pitagoran teoremon. Ĉar, se la samarea cirklo estas 98, la longeco de la responda kvadrata latero (hipotenuzo) estas : 98 : 3,1406 =
31,20 ($R^2$), 31,20 $\sqrt{5,589}$ (radiuso). La cirkla diametro do estas : 5,589 x 2 = 11,178, kaj la latero de la kvadrato (hipotenuzo) : 11,178 x 7/7,9 = 9,904 kun reziduo. Per PI 3,1416 la rezulto estas 9,902 ankaŭ kun reziduo, do malpli preciza.

Ĉar la reziduo "kvadratiĝas" per la multiplikado, la rilato 7/9,905 konsekvence estas la preciza rilato inter la latero kaj la diagonalo de la kvadrato.

Tio signifas fakte, ke, se per sia teoremo pri la "racionalaj nombroj" Pitagoro demonstris, ke la diagonalo estas "strekebla sed ne mezurebla", per sia teoremo pri la kvadrato de la hipotenuzo li donis la rimedon kalkuli ĝin.

Konklude :

1. La cirklo kaj la kvadrato estas nedisigeble kunekzistantaj kaj konsiderendaj. La rilato inter ili estas : 7/7,9.
2. La diagonalo, spite al la teoremo de Pitagoro pri la "racionalaj nombroj", estas mezurebla, kaj ĝia rilato kun la latero estas :7/9,905.
3. La nombro PI 3,1406 estas la racionala PI. Ĝi devenas de la divido de la surfaco de iu kvadrato per la kvadrata radiuso ($R^2$) de samarea cirklo. Ĝia senfina precizeco ĝin pravigas mem.
4. La strekado de samareaj cirklo kaj kvadrato (cirklokvadraturo) estas precize efektivigebla, kaj la skemo ricevita per nur strekilo kaj cirkelo (cirklilo) konfirmas kaj pravigas la tri ĉi-suprajn rilatojn. Nur necesas provi kaj kontroli.

Nur restas al mi danki al K-do valo pro liaj senlaca refutemo kaj obstina antikvadraturismo, sen kiuj mi ne sentintus min devigata finsolvi tiun trioblan problemon, kiun nedubeble



naskis la fantaziemo de la grekaj filozofoj-matematikistoj por anticipe ridi pri la embaraso de la estontaj generacioj. Ĉar ili estis fakuloj, ili ne povis ne scii pri la solvoj de tiuj problemoj, do, ja famaj farsuloj ili estis. Sed, konstateble, la samon eblas diri pri iliaj nuntempaj kolegoj trans la jarmiloj.

Kvadraturiste via.

Nome de J. Ŝtrumfo raportas
la Anonima B.G.D. el EYMET

---

Maljunulo rakontas :

## RAKONTO PRI MEDIKAMENTO

*Antaŭ pli ol 50 jaroj, dum mia metia migrado, mi haltis ĉe entreprenisto por farigi iun laboron.*

*Dum mia surloka laborado, mi bezonis helpon de iu viro por transloki por mi sola tro pezan aparaton. Por tion fari, mi petis, ke oni alvoku la gardiston de la ejo.*

*- Ho ve, oni diris al mi, tiu viro mortos baldaŭ... eble post unu horo... La kuracisto diris, ke oni ne plu povas fari ion, oni devas pacience atendi la morton.*

*Kiam mi aŭdis tiun parolon, mi decidis viziti tiun viron, sen alia ideo ol klarigi al li, ke, laŭ mi, ekzistas nek Dio nek paradiza ĉielo nek eterna infero...*

*Estos kiel estos!... Ĉar li devas morti, li diru al mi sian lastan deziron.*

*Aŭskultinte min, li diris : "Nu, ĉar mi devas morti, alportu al mi grandan botelon da brando kaj bongustan kolbason por ke mi havu bonmemoraĵon pri tiu ĉi tero."*

*La sekvintan tagon, dum mi ne plu pensis pri li, li alvenis, demandante al mi, ĉu li povas min helpi. Li sentis sin tute saniĝinta.*

*Efektive, ni finis la laboron ĝis plena kontentiĝo de ĉiuj... kaj eble li vivas ankoraŭ hodiaŭ...*

*-nn-*

---

**ĈIES VOĈO** - Kelkaj rimarkoj pri la n° 62 - **P.M.G.**

Pri nombroj - Kontraŭe al la indiko de Valo, la nombro $\sqrt{2}/2$ ne estas "perioda decimalo" sed "transcenda nombro". Same kiel pi, ĝiaj decimaloj estas senfine hazardaj. La nombro pi estis kalkulata antaŭ 50 jaroj kun 700 decimaloj, sed nun perkomputile kun... 200 000 decimaloj !

Pri pronomoj - La serio "iŝi, iĝi..." sur modelo de "ili" estas alloga sed tute ne ebla. La formo "iĝi" estas tute erariga kaj nekomprenebla. Restas nur la solvo "ŝij, ĝij..." regule formata per la marko de pluralo "-j". La ekzemplo de la franca lingvo, kie la fonetika formo "-ij" estas komprenata, (bi, bille...) montras ke tiu formo eblas kiam necesas.

Lina Gabrielli

# FI...

*Mi nun ne plu asertas, ke sufiĉas esti ne juna kaj ne alloga, ke sufiĉas posedi la plej aĉan aŭtomobilon, por eviti fi-amoraĵn aventurojn.*

*Ja, iun aprilan matenon, revenante al mia urbo el la vilaĝo de miaj gekuzoj, kie mi ripozis en agrabla silento, mi vidis, ke verda aŭtomobilo haltis proksime de la mia - iom tro proksime por ke mi ne ekkoleretu - kaj de ĝi aĝa viro venis sveltpaŝe al mi.*

*- Ho, nur nun mi vidas, ke vi ne estas la frizistino, kiu havas laborejon en la proksimeco de la placo S. Petro la Martirigita... Pardonu! - li ĝentile diris.*

*- Ne gravas, - mi respondis kaj mi estis preta por saluti. Sed li daŭrigis :*

*- Fraŭlino, komprenu min! Mi estas vidvo de mallonga tempo kaj nun kaptis min terura sento de soleco, de malĝojo... bezonus mi paroli...*

*- Mi fakte komprenas, pro rekta sperto, kion signifas perdi amatan estulon... se vere mi povas vin helpi aŭskultante viajn vortojn, mi estos tre kontenta...*

*- Mi konstatas, ke vi estas tre afabla... pro tio mi kuraĝas peti etan favoron. Ĉu vi volas lumigi por mia edzino kandeleton en preĝejo ?*

*- Kial ne ?*

*- Dankon kaj... Bonvolu atendi min kelkajn minutojn. Mi iros al mia aŭtomobilo por preni monon.*

*- Por simpla kandeleto ne necesas mono. Mi povas ĝin bruligi senĝene.*

*- Verdire ne temas nur pri pago. Mi volas doni al vi sumeton de mono, por ke vi donacu ĝin al iu bezonanto, honore al mia edzino. Ĉu konsentite ?*

*- Konsentite.*

*Dum la sinjoro kuris al sia aŭtomobilo, mi meditis : al pastro en Rimini, esperantisto, bruliĝis preĝejo. Mi sendos la monon al li... aŭ...*

*La sinjoro revenis kaj haltis denove apud mia stirilo. En la maldekstra mano li tenis ducent mil lirojn.*

*Li tuj diris :*

*- Jen la mono... sed... mi...*

*- ??*

*- Mi volas de vi... kiseton...*

*Kaj sen doni al mi tempon por respondi, li balbutis :*



*- Kiseton ne... mi volus nur kareson...*

*Pri la kandeleto li eĉ ne aludis.*

*Al kio mi surlevigis la kapon sen lin rigardi kaj kun serioza mieno mi reagis :*

*- Tio ne, tute ne !*

*La lasta vido estis la du monbiletoj, kiuj pendis el liaj fingroj dum mi reaktivigis la motoron.*

---

## Kial ne paroli pri...
## "LA GAZETO" ?

Same kiel multaj esp-istoj mi ricevis la provnumeron (n-ro 0) de la nova E-revuo "La Gazeto". Supozeble, varbcele. Tial ke mi ne estas nova esp-isto, mi tuj komprenis, ke temas pri gazeto lanĉata de anoj de NEM, la Neŭtrala Esperanto-Movado, kreita post la UEA-kongreso en Hamburgo, kiam alia teamo transprenis la gvidadon de tiu asocio post multjara prezidado de Ivo Lapenna. Ivo Lapenna klarigis sian vidpunkton pri la afero (laŭ li, puĉo) en - laŭ mi - de ĉiuj leginda libro "Hamburgo en retrospektivo".
Nu, mi supozas, ke iuj ortodoksaj UEA-anoj eble emos forĵeti tiun NEM-aĵon, ke blindaj SAT-anoj eĉ ne foliumos tiun "neŭtralaĵon". Domaĝe. Domaĝe, ĉar unue, kreo de nova E-gazeto estas ĉiam atentinda eventeto ; due, ĉar tiu "Gazeto" anoncas, ke, aperonte 18 fojojn jare, ĝi estos la plej ofta E-periodaĵo ; trie, ĉar krome tiu provnumero estas per si mem sufiĉe loga, por ke oni emu "vidi la sekvon".
La aspekto estas tre agrabla. Tre nete presita kun multaj ilustraĵoj, sur dika, preskaŭ luksa papero. Lingvo ĝenerale tre ortodoksa, gramatike. Tamen, unu escepto : la recenzo pri la libro "7000 tagoj en Siberio" (cetere, interesa recenzo) entenas kelkajn gramatikajn monstraĵojn: "komenci" uzata netransitive, konfuzo inter "aspekti" kaj "aperi" kaj kelkaj aliaj makuloj sur la paĝo II, kontrastas kun la cetero. Ĉu franco estas tiu J.E., kiu subskribis la recenzon ? Laŭ la naturo de liaj lingvaj eraroj, oni povus supozi...
La tono de la tuta gazeto estas donita de E. de Zilah, la redaktoro : "Por alveni al esperantismo endas pleniĝi de la Esperanto-kulturo...". Mi aparte ŝatis la humuran kontribuon de B. Aunis (saluton al tiu Laŭtulo!), kun granda intereso legis la unuan parton de studo de W. Zelazny pri la Zamenhofa verko (saluton al tiu edzo de Laŭtulino!), kaj studon pri "Metropoliteno", la verko de Varankin. Bonvena estas la rubriko "Nia Lernejo" (oni neniam sufiĉe lernas...) sed ne la formo "putrita viando" (anst. "putrinta") sur paĝo 19, samrubrike.
Rimarkindas ankaŭ la uzado de "ekuo" kiel monunuo. Ĝi ja estas pli konata ol la iam provita "stelo", ĉu ne ? Ne mankas la polemika parteto, kiun ne ĉiuj facile "digestos" : "La Gazeto" anoncas la okazigon de NEM-kongreso

en Aùstrio, 1987 : "Ne ĉio devas okazi dum la jubilea jaro, en totalismaj landoj, se ni ne volas, ke la publikopinio malestime forpuŝu nian idealon, kvazaù fanatikan apogon al totalismoj."
Ve, mi memoras epokon, kiam la tiam Lapenna-a UEA kongresis en Hispanio sub patronado de iu "Franco". Feliĉa evoluado...

Kribo

**********************************************************************


## Aforismoj pri esperanto

*1. Naciaj lingvoj similas al dornhavaj arbustoj ; esperanto al sendornaj kaj multfloraj.*
*2. La plej bonaj fruktoj kreskas ĉe arboj kulturitaj ; la artefarita lingvo esperanto rezultas de simila procedo.*
*3. La aŭtoro de esperanto ĉerpis el la naturo la vivon de sia lingvo kaj racie direktis ĝin al la celo : facila interkomprenîĝo tutmonda.*
*4. La leĝoj kiuj direktis la formiĝon de l'naciaj lingvoj fontas el la instinkto ; la aŭtoro de esperanto estis gvidata de la racio.*
*5. La naciaj lingvoj iel similas al ĉambro, kie kuŝas senorde belaj objektoj ; esperanto similas al la sama ejo, post kiam ĉio estas tie bonordigita.*
*6. Kvindekjara praktikado pruvis, ke esperanto estas taŭga, fleksebla kaj senlime riĉigebla interkomprenilo por homoj el ĉiuj rasoj.*
*7. Esperanto donas al la homoj la eblon ŝpari tempon, energion kaj atingi pli perfektan interkompreniĝon ol per la uzado de multaj lingvoj naciaj.*
*8. Per praktikado de esperanto oni kvazaŭ malfermas al si fenestrojn al ĉiuj mondpartoj.*
*9. Por ke la homoj interfratiĝu, necesas unue, ke ili povu interkompreniĝi ; la plej taŭga interkomprenilo estas esperanto.*
*10. Samlingveco ne estas sufiĉa kondiĉo por ke la homoj interfratiĝu, sed ĝi estas tamen nepre necesa.*
*11. La reciproka situacio de du malsamlingvaj homoj iel similas tiun de bestoj antaŭ homoj.*
*12. Samspecaj bestoj el la tuta mondo blekas same ; por ke la homoj ne malsuperu la bestojn tiurilate, ili devas lerni kaj praktiki esperanton.*

E. Lanti
(En Ĉilio, 3.6.40)



**KRUCVORTENIGMO de Sfinksido** (s.f. = sen finaĵo)



Horizontale :

1. En tia kunveno, oni babilas trinkante kafon. 2. Kudrilego (s.f.). Tian, kiu malhelpas la iradon 3. Ĝi estas ofte ina sed neniam idnaska (s.f.). Nazkatara. 4. Dormigilo, kiu agas, kiam oni aùdas flugi muŝon (s.f.). 5. Ĝi devigas la interagon de neĝoforpuŝilo. 6. Nombro, kiu dividas en du (s.f.). Alia nombro. 7. Trompaĵo per kiu oni celas la malutilon de aliulo (s.f.). 8. Vinberujo. En ŝakludo, samtempa movo de la reĝo kaj de unu el la turoj. 9. Ĝi malhelpas la avarulon enŝovi la manon en la poŝon, laùdire. Travivaĵo, evento (s.f.). 10. La reĝoj tenis ilin por malenuigi sin. Kiam maŝinoj estas ekster ĝi, oni forĵetas ilin. 11. Femalon. Kiam ili estas pluraj, malhelpas al la nedecidemuloj.

Vertikale :

1. Elektigi la iritan vojon...laù la karto. 2. Alpaŝo, alproksimiĝo (s.f.). Unuanuran, solsolan. 3. Kiam ŝi estas E-ino, verŝajne ŝi legas Laùte... 4. Sufikso. La E-istoj ne hezitu amasigi ĝin sur Osson !... 5. Ĝi estas tia, kia estas la birdo (s.f.). Interjekcio esprimanta bedaùron. 6. Ricevadas dum difinita tempo "Laùte", "Sennaciulo", ktp. Adverbo. 7. Mezurilo. 8. Nuancas per ĉielarkaj koloroj. Burĝono (s.f.). 9. Kaptos de ia maniero. Arbitra ordono, dekreto. 10. Groteskaj bildoj reflektitaj de kurba spegulo.

---

**SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO de n-ro 62 :**

**Horizontale** : I. STAĤANOVISMO. II. KARAVANO. UNU. III. RE. MATO. SPES. IV. IL. ERUPCIEME. V. BODLERO. AROJ. VI. OJ. ECARO. PZ. VII. DIORIT. VIII. AMEN. KONA. IX. MONOLOGANTAJ. X. BRI. OGR. IE. XI. RATAFIO. SKIO. XII. OVODUKTO. TUJ.

**Vertikale** : 1. SKRIBOĈAMBRO. 2. TAELOJ. MORAV. 3.AR. ZENITO. 4. ĤAMELEONO. AD. 5. AVARECO. LOFU. 6. NATURA. LOGIK. 7. ONOPORD. GROT. 8. VO. OI. 9. SIA. OKNIS (SINKO). 10. SUPERPROTEKT. 11. MNEMOZINA. IU. 12. OUSEJ (JESUO). TAJDOJ.

---

**Abonanto de L!** **Monprovizanto (al BS/L!)**

**VIA SITUACIO**

Via abono estas **finita**

registrita ĝis

En via konto

Restas : +

Mankas : -

****************************************************************

**La venonta L! aperos fine de januaro 1986**

Se alvenos sufiĉe da "materialo", ĝi estos **duobla**, t.e. pli ol 60-paĝa. Ĝi entenos kiel ĉefan parton 20-paĝan eseon de la ĉeĥa disidento Milan Ŝimeĉka "Nia angorplena socio" (trad. de Aldo Revel) kaj la kutimajn rubrikojn : novelon de Guy de Maupassant (majstre tradukitan de Daniel Luez), "Dua fantazia vago for de la Fundamento" (en la rubriko "Analiza Gramatiko" de Luis Mimó), pliajn opiniojn pri "Proprumemo", "Vortoj de Maljunulo", ktp, ktp.

Per pli ampleksaj numeroj "Laŭte!" orientiĝas al revua formulo kun pli da literaturaj tekstoj.

En 1985 la jarkolekta amplekso atingas 306 paĝojn, kio estas rekordo, per 3 "duoblaj" numeroj kaj 3 ordinaraj. En 1986, kompense al plialtiĝo de la abonprezo, ni planu **4** duoblajn numerojn kaj sume ĉ. 340 paĝojn. Sed, kompreneble, la efektivigo de tiu ambicia plano dependas de ĉies verkemo!

Por kiuj ŝatas sekvi la evoluon de L!, jen statistiketo pri la bultena amplekso kompare al la abonprezo. Tiel reliefiĝas la fakto, ke L! estas ja unu el la plej malmulte kostaj E-gazetoj (se ne la plej ĉipa!). Jen argumento por vi, se vi deziras varbi iujn el viaj konatoj !

Ankaŭ la abonnombro estas rekorda ĉi-jare. Ĝi ĵus atingis 400. Ve, se la ĝisnuna prizorganto restos sola por la eldonado, "Laŭte!" ne povos akcepti pli ol ĉ. 450 abonojn. Restas do ĉ. 50 "abonlokoj", kiujn ni volonte proponas al tiuj, kiuj ŝatas : **malmulte elspezi, multe legi, kaj ĉefe sin esprimi libere en sentabua gazeto.**

Al tiuj novaj gelaŭtuloj estos donacitaj "premie" (ĝis elĉerpiĝo) broŝuretoj de SAT-Broŝurservo kaj... la 450a abonanto tutsimple ne pagos la sekvontjaran abonon !

Amike al ĉiuj, kaj ĝis la venonta numero, Kribo.

****************************************************************

| | | | paĝkosto | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1977 | 162 paĝoj | 10 FF | 0,061 | 1982 | 272 paĝoj | 15 FF | 0,055 |
| 1978 | 176 paĝoj | 10 FF | 0,056 | 1983 | 262 paĝoj | 18 FF | 0,068 |
| 1979 | 224 paĝoj | 10 FF | 0,044 | 1984 | 264 paĝoj | 20 FF | 0,075 |
| 1980 | 242 paĝoj | 12 FF | 0,049 | 1985 | 306 paĝoj | 25 FF | 0,081 |
| 1981 | 272 paĝoj | 14 FF | 0,051 | 1986 | 340 ? | 28 FF | 0,082 ? |

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP nº 58651